

# EL POPOLA ĈINIO

中國報

12

1974





Infanoj en la festotago

# Celebro de la 25-a datreveno de la fondiĝo de la nova Ĉinio

**L**A unua de oktobro de la kuranta jaro estis la 25-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.


En tiu ĉi brila festotago, ĉie en nia lando, de la ĉefurbo Pekino ĝis la diversaj urboj kaj vilaĝoj en ĉiuj provincoj kaj aŭtonomaj regionoj regis gaja, revolucia atmosfero. Oni aranĝis multajn celebrajn aktivadojn en parkoj kaj aliaj lokoj. Tamtamente kaj tamburante, kantante kaj dancante oni varme celebris la Nacian Feston kaj novajn venkojn akiritajn de nia lando en socialisma revolucio kaj socialisma konstruado sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kun Prezidanto Maŭ Zedong kiel ĉefo kaj montris la unuiĝon de la diversaciaj popolanoj de la tuta lando kaj ilian firman decidon por akiri pli grandan venkon.

En la festa ĉefurbo, ĉu super stratoj aŭ stratetoj, la ruĝaj kvinstelaj flagoj flirtis en vento. La Tian-anmen-placo aspektis aparte majeste kaj impone. La giganta portreto de Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de la ĉina popolo, pendis en la centro de la ruĝa muro de Tian-anmenpordego. Ambaŭflanke de la placo staris la gigantaj portretoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin. Ĉe la sudo de la placo

staris la giganta portreto de D-ro Sun Jatsen. Ĉirkaŭ la Monumento de Popolaj Herooj sur la placo prosperas freŝaj floroj.

La unuan de oktobro antaŭ 25 jaroj, ĉi tie hisiĝis la unua ruĝa kvinstela standardo kaj Prezidanto Maŭ solene proklamis al la tuta mondo la fondiĝon de la Ĉina Popola Respubliko. Ekde tiam la ĉina popolo stariĝis!

Komence de tiu tago la ĉina popolo prenis al si sian sorton. Unuiĝante kiel batalanta revolucia tuto ili venke antaŭenmarŝas laŭ socialisma vojo. Precipe en la Granda Proleta Kultura Revolucio, ili frakasis la du burĝajn komandejojn estratajn respektive de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ kaj frakasis la blokadon, agreson kaj renverson fare de la imperiismo kaj socialimperiismo. Nun ili populare, profunde kaj persiste disvolvas la movadon de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio. En la socialisma Ĉinio okazis giganta ŝanĝiĝo. La proleta diktaturo estis senprecedence solida. Dank' al persisto je principoj de **sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur la propraj fortoj**, la socialisma konstruado de Ĉinio vige disvolviĝas. La totala produktokvanto de greno plimultiĝis de 110



*Grandioza nacifesta akcepto okazigita de Ĉefministro Ĝou Enlaj*

milionoj da tunoj de 1949 ĝis pli ol 250 milionoj da tunoj de 1973 kaj dank' al tio realiĝis memprovizo de greno. Sendependaj, kompare kompletaj industria sistemo kaj nacia ekonomia sistemo kun socialisma agrikulturo kiel bazo estas formiĝantaj en Ĉinio. La malriĉa, postiĝinta, malnova Ĉinio jam ŝanĝiĝis en socialisman novan Ĉinion kun unuapaŝa prospero.

Por celebri la 25-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, Ĝou Enlaj, vicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro okazigis grandiozan nacifestan akcepton en la Popola Halo en Pekino, vespere de la 30-a de septembro. Ĝin ĉeestis la gvidantoj de nia lando, reprezentantoj de

diversaj frontoj kaj diversaj flankoj kaj la amikoj el diversaj landoj de la kvin kontinentoj, sume pli ol 4,500 homoj.

Ĉefministro Ĝou donis tostan paroladon en la akcepto plena de atmosfero de unuiĝo kaj triumfo, por esprimi varman gratulon al diversnaciaj popolanoj de la tuta lando. Li diris: "Ni devas daŭre kritiki Lin Biaŭ kaj Konfucion, persisti en daŭra revolucio sub la proleta diktaturo, persisti en sendependeco, memstareco, kaj sinapogo sur la propraj fortoj; ni devas unuiĝi, lukti en malfaciloj kaj brave antaŭenmarŝi laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ."

En sia tosta parolado, Ĉefministro Ĝou Enlaj ankaŭ esprimis elkoran dankon al la tutmondaj popolanoj kaj amikoj de diversaj landoj pro ilia subteno kaj helpado

al Ĉinio. Li diris: “Same kiel antaŭe, ni ĉiam staras ĉe la flanko de la tutmondaj popoloj por kune batali kontraŭ imperiismo kaj social-imperiismo ĝis la fina venko.”

La unuan de oktobro, en la Kultura Palaco de Laboruloj, Ĝongŝan-parko, la Somera Palaco kaj aliaj parkoj de Pekino la celebraj aktivadoj estis pli varmaj, riĉaj kaj buntaj ol en la pasintaj jaroj. La gvidantoj de nia lando, la ĉefurba popolamaso, la reprezentantoj de niaj samlandanoj el Tajvan, Hongkongo kaj Aŭmen, kaj elmigrantaj ĉinoj kune solenis la festotagon. Ankaŭ gastoj el pli ol 80 landoj kaj regionoj partoprenis en la ĉefurbaj celebraj aktivadoj kaj estis varme akceptataj.

En tiu festotago, ĉie estis ĝojaj homamasoj. Enirinte en ĉiun ajn parkon, oni renkontis ĉiam vizaĝojn kun radianta rideto. Sur la scenejo oni prezentis streĉan laboradon de ŝtalistoj, karbistoj kaj ŝpinteksitinoj, prikantante venkojn sur la industria fronto. La komunumanoj tenis en siaj manoj koton-kapsulojn aŭ svingis tritikspikojn informante ĝojigajn novaĵojn pri

riĉaj rikoltoj. Same kiel en multaj aliaj urboj de la tuta lando, ankaŭ en Pekino okazis tre grandaj ŝanĝoj en la pasintaj 25 jaroj. Nun ĝi jam disvolviĝis de konsumaraŭro, kiu eĉ ne fabrikis unu biciklon, al socialisma industria bazo. Ĝia totala industria produktovaloro de 1973 plimultiĝis 110-oble kompare kun tiu de 1949. En ĝia antaŭurba kamparo la po-mua produktokvanto de greno nun plialtiĝis 4.5-oble kompare kun tiu de la periodo tuj post la Liberiĝo.

En la pasintaj 25 jaroj, en nia lando okazis profunda revolucio en la politika kaj ideologia kampoj. Multaj programeroj prezentitaj en la Nacia Tago vivece montris la decidon de la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj pluapasa okupi la ideologian kaj kulturalan frontojn per socialismo. Tiuj, kiuj estis nomitaj “kruĉuloj” en la malnova socio, nun fariĝis ĉefa forto en la kritiko kontraŭ Lin Biao kaj Konfucio. Ili ĉiuj kritikis renegaton kaj perfidulon Lin Biao, kiu intencis restaŭri kapitalismon, kaj la ideologion de la reakcia, dekadenca klaso — la doktrinojn de Konfucio kaj Mencio. Lan Binpen,



*Arta prezentado en la festa tago*



*Laboristoj de la ĉefurbo en  
ĝoja renkontiĝo*

maljuna laboristo de la Ĉefurba Ferŝtala Kompanio kaj unu el la spektatoroj de la prezentado, dorsportis karbon en malgranda minejo en sia aĝo de 14 jaroj, kaj suferis teruran vipadon de kapitalisto. Nur post la Liberiĝo li senkateniĝis kaj aktive partoprenis en revolucio kaj produktado. En la movado de kritiko kontraŭ Lin Biau kaj Konfucio li kaj kvar junaj laboristoj kune legis verkojn de Marks, Lenin kaj Prezidanto Maŭ, komentariis verkojn de la legalistoj de la pasinteco de nia lando per historia materiisma koncepto, kaj estis laŭdata de la amasoj.

Inter la vizitantoj al la festa prezentado en la parkoj troviĝis la revoluciaj instruistoj kaj studentoj de Kinghua-universitato kaj la Pekina Universitato. Antaŭ la granda kultura revolucio, en la du universitatoj regis burĝaj intelektuloj kaj la laboristaj,

kampanaj kaj soldataj studentoj estis subpremataj. Nun granda nombro da laboristaj, kampanaj kaj soldataj studentoj lernas tie. Ili kombinis teorion kun praktiko kaj akiris rimarkindajn atingojn en la lernado. La laboristaj, kampanaj kaj soldataj studentoj de fakultato pri hidraŭliko de Kinghua-universitato, prenis la Flavan Riveron kiel lernoĉambron por lerni fakan teorion, partoprenante persone en la praktiko de dragado, kaj samtempe kontribuis sian forton por la radikala reguligo de tiu rivero.

La teatraĵoj, kantoj, dancoj, muzikoj, k.a. prezentitaj en ĉiuj parkoj entuziasme prikantis socialismajn novajn aferojn, novajn sukcesojn kaj novajn fizionomiojn aperintajn en la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la movado de kritiko kontraŭ Lin Biau kaj Konfucio. Tiuj riĉaj kaj buntaj pro-

grameroj montris, ke sub la stimulado de la modelaj revoluciaj teatraĵoj prosperas la kultura kaj arta fronto de nia lando, kaj sane kreskas socialismaj kulturaj kaj artaj laborantoj.

La laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj de la Centra Instituto por Nacimalplimultoĵ partoprenantaj en celebraj aktivadoj en la parkoj venis el kelkdek nacioj de nia lando. Per siaj propraj naciaj lingvoj ili varme prikantis nian grandan gvidanton Prezidanton Maŭ kaj la grandan Partion kaj esprimis sian komunan senton: "Partio faras nin orfojn kaj servutulojn de la malnova socio en studentojn. Nur dank' al la Partio kaj Prezidanto Maŭ, aperas la nova Ĉinio kaj ni havas hodiaŭan feliĉon." La komunaj revoluciaj interesoj kaj komuna revolucia celo forte interligas la korojn de la diversnaciaj popoloj de nia lando.

Reprezentantoj de la komandantoj kaj soldatoj de la Popola Liberiga Armeo kaj milicanoĵ, kiuj faris meritojn en memdefenda batalo kontraŭ agreso ĉe Hiŝa-insularo de nia lando en 1974, partoprenis en la festa celebrado de la ĉefurbo. La venko de tiu batalo manifestis la senkomparan forton de la unuiĝo de la armeanoj kaj popoloj de nia lando.

En la nokto de la festotago, pompe brilis la lamplumoj sur Tiananmen-placo. Buntaj artfajraĵoj jen kaj jen leviĝis alten al la ĉielo super la urbo kaj antaŭurbo kaj bele iluminis la firmamenton de la nacifesta nokto. Profundiĝante en la maro de ĝojo oni emocie rememoris la pasintecon kaj

aspiris pri bela estonteco. Ili kun plena memfido decidis iri laŭ la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ, pluapase disvolvi la bonan situacion kaj fari la socialisman patrolandon pli prospera kaj potenca.

*Tajvan-aj ĉinoj el Usono kaj Japanio ĝoje celebras la Nacian Feston kune kun la popoloj de la patrolando en Ĝongŝan-parko de Pekino.*



*Han-aj kaj tibetanaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kune sin amuzas en la Popola Parko de Lasao.*



# Nova petrolkampo

## memkonstruita

**L**A petrolistoj de Ĉinio konstruis alian grandan petrolkampon nomatan Ŝengli ĉe la bordo de Bohaj-golfo.

La grandarea petrolkampo kun abunda riĉfonto troviĝas relative proksime de niaj ĉefaj industriaj kaj agrikulturaj regionoj kaj en oportunaj kondiĉoj de transportado mara kaj tera. Tial ĝia ekspluatado kaj konstruado havas gravan signifon por disvolvi la petrolan industrion kaj nacian ekonomion de nia lando.

La petrolkampo estis ekkonstruita en la jaro 1964. La petrolistoj venintaj de Daking kaj aliaj


lokoj de la lando kune kun la prospektorantoj de Ŝandong disvolvis la kampanjon por prospektori kaj ekspluati Ŝengli-petrolkampon per koncentrita forto.

Direktate de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ Zedong kaj principo “sendependeco, memstareco kaj sinapogo sur propraj fortoj”, la petrolistoj, kadroj kaj teknikistoj partoprenantaj en la kampanjo levis amasan movadon “lerni de Daking en industrio”. Prenante kiel ekzemplon la “ferulon” Vang Ginhi, avangardan batalanton de la ĉina laborista klaso, kaj disvolvante revolucion spiriton,



*Nafto en transportado*





*Nova petrolkampo konstruita en dezerto*

ili plenenergie batalis kontraŭ la naturo kaj faris konstruadon en malfaciloj.

En la komenca periodo de la kampanjo, la ĉefa putejo estis difinita ĉirkaŭ la vilaĝo Ŝengli. La loko en malalta situo ofte havis stagnan akvon ĝisgenue profundan en pluva sezono. Kaj tiam veturiloj kaj bormaŝinoj ne povis esti enportitaj. Kun Daking-anoj kiel ekzemplo, la laboristoj transportis kompletan post kompleto da boraj maŝinoj cent tunojn pezaj al la putejo per siaj manoj kaj ŝultroj.

La formacio de tiu loko estas kompleksa, subteraj faŭltoj multaj kaj la roktavoloj jen molaj jen malmolaj. En tiaj kondiĉoj, la ŝlosila problemo por plirapidigi la prospektoradon estis tio ke ĉu oni povas bori la puton rapide kaj vertikale aŭ ne. Sub la direkto de la filozofia penso de Prezidanto Maŭ, ili analizis kontraŭdirojn, kuraĝis en praktikado kaj fine resumis serion da metodoj por putoborado. Tio multe rapidigis la putoboradon, altigis la kvaliton kaj akcelis la prospektoradon kaj ekspluatadon de la petrolkampo.

Sub la gvido de diversnivelaj partiaj komitatoj kaj forta subteno de la loka garnizono kaj amasoj, la laboristoj kaj oficistoj de Ŝengli-petrolkampo unue ekspluatis unu altproduktan petrolkampon en Ŝengli-vilaĝo per malpli ol unu jaro. Ili diris: “Ni boris altproduktajn petrolputojn en Ŝengli-vilaĝo, tio estas venko en lerno de Daking kaj venko de Maŭzedongpenso. Do ni nomu la petrolkampon Ŝengli!” (Ŝengli signifas en la ĉina lingvo venkon.) De tiam, la petrolkampo ekfamigis kun sia nomo.

La Granda Proleta Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidita de Prezidanto Maŭ multe altigis la konscion de la vasta amaso de kadroj kaj laboristoj pri batalo inter la du klasoj kaj la du linioj kaj antaŭenpuŝis diversajn laborojn de la petrolkampo per senprecedenca rapideco.


En la komenca periodo de la kultura revolucio, la laboristoj kaj kadroj de la 32104-a putobora taĉmento decidis atingi novan sukceson en prenado de rokkerno per longa tubo. Kune kun sciencaj institutoj, ili faris teknikan renovigon kaj kreis

kompleton da novaj instrumentoj por preni rok-kernon kaj la enbora longeco por preni rokkernon en unu fojo atingis kelkajn, dekelkelkajn kaj kelkdek metrojn, kaj fine ili kreis en tio la tutlandan plej altan rekordon de 102.32 metroj, kun centprocenta efikeco, kio liveris kompletajn materialojn por esplori tertavolojn.

En 1966, la unua jaro de la Granda Proleta Kultura Revolucio, la 3252-a putobora taĉmento kun honora titolo "heroa putobora taĉmento en tipo de la ferulo" jam kreis per grandaj bormaŝinoj novan rekordon de enbora longeco de 53,000 metroj en unu jaro, kaj per tio donis ekzemplon al ĉiuj putoboraj taĉmentoj de la petrolkampo. Poste ili prenis la sloganon elmetitan de Vang Ginhi "bori mil metrojn en tago, dek mil en monato kaj cent dekkvin mil en jaro", kiel sian normon. Laboristoj diris: "La revolucia afero devas esti farata per revolucia spirito, kaj la heroaĵoj devas esti kreataj per heroa spirito!" Ili modeste lernis progresintajn spertojn de 14 taĉmentoj, liberigis sian penson, kuraĝe aplikis grandan pumpilon kaj faris sinsekve kelkdek-fojan altrapidan boradon, malŝparante neniun sekundon, kaj fine kreis en la jaro 1973 tutlandan rekordon de jara enbora longeco de 151,420 metroj.

Puŝate de la kultura revolucio, ĉiufankaj prospektorado, ekspluatado kaj konstruado estas disvolvataj tra la tuta petrolkampo, nova atingo estas

*Teknikistoj kaj laboristoj de la petrolkampo kune studas pri rimedoj por alta kaj stabila produkto.*



akirita en ĉiu jaro kaj la produktokvanto de nafto senĉese altiĝas.

La granda movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio pluapaaŝe liberigis ilian penson kaj vigligis ilian revolucionan spiriton. Dum la profunda kritiko al la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Lin Biaŭ kaj kritikado kontraŭ konfucianismo, la ideologio de reakciaj dekadencaj klasoj, la vasta amaso de laboristoj kaj oficistoj de la petrolkampo pluapaaŝe altigis sian memkonscion pri daŭrigo de revolucio. Laboristoj diris: "Lin Biaŭ faris restaŭron, ni do firme oponas kontraŭ ĝi; Lin Biaŭ subfosis la socialismon, ni do devas energie konstrui ĝin; Lin Biaŭ kalumniis la grandan kulturalan revolucion, ni do devas firmigi kaj disvolvi ĝiajn grandajn fruktojn per niaj konkretaj agoj kaj plirapidigi la paŝojn en disvolvado de petrolo industrio."

Foje, la tria konstrua brigado de la petrolkampo estis asignita per la tasko enterigi olekondukan tubon kun diametro de duonmetro trans la Flava Rivero, sub ĝia lito pli ol 700 metrojn larĝa por interligi la oletubojn sur la ambaŭ bordoj. Se oni aplikus siatempe la malnovajn metodojn, oni bezonus ĉ. jaron por plenumi la taskon, tamen oni postulis tiam plenumi ĝin en tri monatoj. Vere malfacila estis la tasko. La laboristoj kaj oficistoj firme diris: "La ŝtato bezonas petrolon, kaj ni nepre devas plenumi la taskon ĝustatempe." Ili tuj venis al la bordo de la Flava Rivero kaj komencis streĉan provadon kaj enketadon. Post unumonata klopodado, ili akiris grandan kvanton da materialoj, kiu liveris sciencajn donitaĵojn al la konstruado. Kaj poste, dank' al saĝo de la amaso ili ellaboris novan konstruan projekton. Ili laboris sur rivero per flosŝipo kun diversaj ekipaĵoj. Post kvin tagnokta laborado, la olekonduka tubo liganta la ambaŭ bordojn estis kuŝigita en fundo de la rivero. Tio garantiis la ĝustatempan produktadon de la nova olekampo kaj transportadon de nafto. Tiu kuraĝa teknika renovigo estas kristalo de la saĝo de laboristoj.

Hodiaŭ, retrorigardante la dekjaran batalan historion, la vasta amaso de petrolistoj estas plena de ĝojo pri venko. Tamen ili montris neniom da memkontenteco. Ili esprimis, ke la pasintaj dek jaroj estas nur startpunkto por la venontaj pli grandaj venkoj. Ili firme decidis diligente studi marksismon kaj leninismon kaj la verkojn de Prezidanto Maŭ, persisti en daŭra revoluciado kaj pli bone konstrui Ŝengli-petrolkampon por fari pli grandajn kontribuojn al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.


# La nove konstruita Hunan-Gujĝoŭ-a Fervojo



**L**A Hunan-Gujĝoŭ-a Fervojo de nia lando komenciĝas de Ĝuĝoŭ de Hunan-provinco kaj finiĝas en Gujĝang de Gujĝoŭ-provinco. Ĝia orienta fino ligiĝas kun la Ĝegiang-Gianghi-a Fervojo (de Hangĝoŭ en Ĝegiang ĝis Nanĉang en Gianghi) kaj ĝia okcidenta fino kun la Gujĝang-Kunming-a Fervojo. Tiel, paralele kun la Gansu-Lianjungang-a Fervojo (de Langĝoŭ en Gansu ĝis Lianjungang en Giangsu), ĝi formis en la sudo de nia lando la duan arterion irantan de oriente okcidenten kaj pro tio ĝi havas gravan politikan, ekonomian kaj strategian signifon.

Niaj sudokcidentaj provincoj Junnan, Siĉuan kaj Gujĝoŭ havas vastan areon kaj abundas je diversaj produktaĵoj kaj mineraloj, sed la trafiko estis tre malfacila pro altaj montoj kaj danĝeraj riveroj. Post la Liberiĝo, la ŝtato sinsekve konstruis la fervojojn Ĉengdu-Ĉongking (en Siĉuan-provinco), Baŭgi-Ĉengdu (de Baŭgi en Ŝenhi

*Plenŝarĝita trajno kuras sur la Hunan-Gujĝoŭ-a Fervojo.*




ĝis Ĉengdu en Siĉuan), Siĉuan-Gujĝoŭ (de Ĉongking ĝis Gujjang), Gujjang-Kunming kaj Ĉengdu-Kunming, rekonstruis kaj konstruis la Gujĝoŭ-Guanghi-an Fervojon (de Gujjang en Gujĝoŭ ĝis Liuĝoŭ en Guanghi). Tiuj fervojoj kunligas la tri sudokcidentajn provincojn kaj aliajn partojn de nia tuta lando. Tamen oni ne povis rekte veturi por atingi la ĉefurbon Pekino kaj la orientan kaj sudcentran Ĉinion kun multe disvolviĝantaj industrioj. Krome la transporta kapablo tute ne povis kontentigi la bezonon de la socialisma konstruado.

En aŭtuno de 1970, la Centra Komitato de la Partio decidis konstrui la Hunan-Gujĝoŭ-an Fervojon. Tiu informo rapide atingis la konstruejon de la Ĉengdu-Kunming-a Fervojo kaj ĉiujn vilaĝojn de Hunan kaj Gujĝoŭ. La fervojkonstruantoj kaj la diversnaciaj popolanoj en la du provincoj estis multe kuraĝigitaj. Ili konkure esprimis: "Hodiaŭ, en la triumfo de la Granda Proleta Kultura Revolucio, la Centra Komitato de la Partio decidis konstrui la Hunan-Gujĝoŭ-an Fervojon, tion ni firme aprobas kaj subtenas." Ĝus fininte la konstruon de la Ĉengdu-Kunming-a Fervojo, pli ol cent mil fervojkonstruantoj, kadroj kaj teknikistoj rekte alvenis al la konstruejo de la Hunan-Gujĝoŭ-a Fervojo. Ankaŭ la provincoj Hunan kaj Gujĝoŭ tuj sendis kelkcent mil milicianojn al la konstruejo por ke ili batalu kune kun la fervojkonstruantoj. En pli ol unu monato tiom multe da konstruantoj jam kolektiĝis sur la konstruejo de diversaj flankoj.

Krom du malgrandaj partoj antaŭe konstruitaj kaj malfermitaj al trafiko, la Hunan-Gujĝoŭ-a Fervojo nove konstruita longas je 632 kilometroj. La linio devas trapasi multajn danĝerajn lokojn kiaj Hjuefeng-montaro en la meza kaj okcidenta partoj de Hunan, la riveroj Hianggiang, Ziŝuj k.a. kaj la montaroj Miaŭling



*Konduktorinoj studas Marksisman - Leninisman por pliprofunde kritiki la reviziisman linion de Lin Biaŭ.*



*Tunelo por pluraj fervojlinioj*

kaj Junvu sur la Gujĝoŭ-a Altebenejo. En multaj partoj de la fervojo troviĝas faŭltoj, kalkkavernoj, subteraj riveroj, moviĝanta sablo kaj mola grundtavolo. 23% de la totala longeco de la fervojo konsistas el pontoj kaj tuneloj. Se oni farus digon larĝan kaj altan je unu metro per la elfositaj ŝtonoj kaj teraĵoj, ĝi povus ĉirkaŭi la ekvatoron je pli ol du fojoj.


Kvankam la konstrua tasko estis peniga kaj malfacilega, tamen la granda armeo de konstruantoj havis centoblan fidon kaj entuziasmon. Kiam la konstruado iris intense, ili okazigis kunvenojn por rememori la tragedian historion de la Hunan-Gujĝoŭ-a Fervojo kaj indigne kritiki la krimojn de la reakcia kuomintang-a registaro, kiu antaŭ la Liberiĝo multe kolektis monon kaj laborfortojn sub la preteksto de konstruo de la fervojo. Frue en 1936, la reakcia kuomintang-a registaro jam entreprenis konstruadon de la fervojo, sed dum kelkaj jaroj ĝi konstruis nur mallongan parton de dekoj da kilometroj. En la antaŭensaltego de 1958, oni rekomencis prospektoradon kaj konstruadon de la

fervojo sed tio denove ĉesis duonvoje pro malhelpo kaj detruado de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki. Sekvante la instruojn de Prezidanto Maŭ Zedong, nun ili firme decidis unuanime streĉi sian energion por frue konstrui la Hunan-Gujĝoŭ-an Fervojon, por regajni la tempon perditan pro malhelpo de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki kaj defendi la proletan revolucian linion de Prezidanto Maŭ per siaj agoj.

Tuj post la atingo de la konstruejo, multaj laboristoj kaj milicanoj starigis nur simplajn kabanonjn anstataŭ loĝdomoj por pli frue sin ĵeti en la konstruadon. Ili senprokraste komencis fosi tunelojn kaj konstrui ŝoseojn eĉ sub lumigo de torĉoj nokte, pro manko de tempo por instali elektrajn lampojn sur la konstruejo. Granda kvanto da ekipaĵoj kaj materialoj amasiĝis en proksimaj stacioj kaj doko, kaj ne povis esti tuj alportitaj, ili do vekte kaj ŝultre portis ilin sur montojn.


La revolucia amasa kritiko pliapaŝe havigis al la laboristoj grandan energion kaj multe akcelis

### *Konstruejo en nokto*



la konstruadon. Hjuéfengŝan-tunelo kun longeco de pli ol 2,000 metroj estas la plej longa tunelo de la fervojo en Hunan. En la jaro 1958 la tunelo estis parte fosita, tial en ĝi stagnis akvo profunda je du metroj. La laboristoj kaj milicianoj, kiuj prenis sur sin la taskon, tuj eniris en ĝin per flosoj por dreni la akvon ne atendante ĝis kiam la maŝinoj kaj ekipaĵoj estis alportitaj. Post ok monatoj de pen aboro ili fine malfermis la orientan pordon de la Hunan-Gujĝoŭ-a Fervojo. Ankaŭ alia tunelo kun sama longeco estis traborita dank' al la kunlaboro de la laboristoj kaj milicianoj per ok monatoj. Parto de la fervojo kuŝanta en Gujĝoŭ devas trapasi altajn montojn, profundajn valojn kaj rapide fluantajn riverojn, kaj du trionoj de la pontoj kaj tuneloj

### *Malŝarĝado sur konstruejo*



inkluzive de la plej longa tunelo kaj la plej alta kaj plej longa ponto koncentriĝis en tiu parto. Tie oni devis plenumi multajn penigajn kaj danĝerajn laborojn. En tunela konstruado ofte okazis plafonfalo kaj la subtera akvo tiel abundis ke en unu tagnokto eltorentadis pli ol 40,000 tunoj da akvo. La moviĝo de monto kaj montdeklivo kaŭzis grandan minacon al la konstruado de la fervojo en kelkaj lokoj. Sed la laboristoj kaj milicianoj kun alta saĝeco kaj sentima revolucia spirito venkis malfacilojn unu post alia kaj bone plenumis ĉiujn taskojn tiel en kvanto kiel en kvalito.

En oktobro de 1972 la Hunan-Gujĝoŭ-a Fervojo estis tute konstruita dank' al la unuanima kunlaboro de la laboristoj kaj milicianoj. La fervojo estis konstruita ne nur kun alta rapideco kaj bona kvalito, sed ankaŭ kun malgranda investo de la ŝtato. Ĉio ĉi tio plene enkorpiĝis la spiriton de la ĝenerala linio de la Partio por la socialisma konstruado: streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie.

La Hunan-Gujĝoŭ-a Fervojo multege mallongigis la distancon de la Sudokcidento ĝis Pekino kaj ĝis la orienta kaj sudcentra Ĉinio, kaj fortigis iliajn interrilatojn. Kun funkcio de la fervojo multe pli boniĝis la trafika stato de la sudorienta Ĉinio.


En la pasintaj du jaroj ekde la funkcio de la fervojo nia sudokcidenta regiono transportis al la orienta kaj sudcentra Ĉinio grandan kvanton da mineraloj, ligno kaj diversaj agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj por akiri tieajn industriajn ekipaĵojn, sterkon, betonon kaj aliajn materialojn. Laŭlonge de la fervojo aperis nombro da novaj urboj kaj fabrikoj. La fervojo multe akcelis disvolviĝon de la ekonomio de la nacimalplimultaj regionoj en okcidenta Hunan kaj orienta Gujĝoŭ. La popolanoj de han-, mjaŭ-, tuĝja-, dung-, buji-, ŝuj- kaj ji-nacioj en la du provincoj varme aklamis la triumfon de la fervojo. Ili nomis ĝin feliĉa vojo kondukanta al Pekino, kie loĝas Prezidanto Maŭ, kaj granda frukto de la Granda Proleta Kultura Revolucio.

Nun, puŝate de la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la vastaj amasoj de laboristoj kaj oficistoj de la fervojo klopodas por altigi la efikecon kaj kvaliton de transportado, por ke la Hunan-Gujĝoŭ-a Fervojo ludu pli grandan rolon en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de la patrolando.

# Trovo de akvofonto en karsta regiono

En Guanghi de la suda Ĉinio troviĝas kalkŝtonaj rokoj, kiuj okupas duonon de la tuta areo de la loko. Pro erozio de pluvoj formiĝis en tiu regiono mirindaj ŝtonarbaroj, multaj kalkŝtonaj kavernoj kaj subteraj fluoj. Kvankam tie abundas pluvo, sed okazis sekeco pro likiĝo de pluvakvo sub teron.


Por helpi la popolon de tiu regiono trovi akvofontojn kaj disvolvi produkton, la guanghi-a hidrologia kaj konstrua geologia taĉmento sentime laboris sur krutajoj kaj en profundaj kavernoj. En lastaj kelkaj jaroj ili vizitis pli ol 120 komunumojn kaj plenumis enketadon pri hidrologia kaj geologia projektoj por kampa akvoutiligo de 28 gubernioj, unuapase faris hidrologian mezuradon al 99 subteraj fluoj, kies totala flukvanto estas 65 kubmetroj po-sekunde dum akvomanka tempo. Krom tio ili faris ankaŭ sciencajn esplorojn kaj atingis certajn sukcesojn en studo pri leĝo de karsta kresko, hidrodinamikaj karaktero kaj kalkulo de karsta akvo.



Malsupreniri en karstan kaverton por esploro



Analizo de karsta roko




Fari mezuradon en karsta kaverno





Koni la leĝon de dislokiĝo de subteraj riveroj

Trejni geologiajn laborantojn por popola komunumo






Ĉe elirejo de subtera rivero




Akvedukto konstruita de popolkomunumo  
alkondukas subteran akvon por irigaciado.



Pumpi subteran akvon per  
pumpilo sur cementa boato  
fiksita ĉe la malkaŝita fenestro  
de subtera rivero

Esploro pri subtera  
akvo per potenciometro

Akvofalo de karsto





Subtera akvo fluas tra kanalo en kampon.

# Granda ŝanĝiĝo de la Flava Rivero

**L**A Flava Rivero 5,464 kilometrojn longa estas la dua granda rivero de Ĉinio. Ĝi fontas el Bajan-Kara-montaro de la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo en okcidenta parto de nia lando kaj enfluas en Bohaj-golfon de la okcidenta Pacifiko.

La Flava Rivero kun flukvanto de 48 miliardoj da kubmetroj ĉiujare torentas inter altaj montoj kaj mallarĝaj valoj, kaj ĝia akvofala distanco atingis pli ol 4,300 metrojn, pro tio ĝi entenas riĉan akvo-utiligan fonton kaj hidraŭlikan energion.

En la longa historio, baseno de la Flava Rivero estis centro de politiko kaj ekonomio de nia lando kaj lulilo de nia antikva kulturo. Kaj samtempe la loko estis ofte atakita de katastrofoj en nia lando dum la pasintaj tempoj pro tio, ke la reakciaj regantaj klasoj ne zorgis pri ordigo de la Flava Rivero. En la periodo de pli ol 2,000 jaroj antaŭ la Liberigo, la Flava Rivero breĉis siajn digojn je pli ol 1,500 fojoj, kaj ĉiu el ili alportis al la ĉina popolo grandajn suferojn. La superakvo forglutis urbojn,

detrus riverfluejojn kaj dronigis sennombrajn vilaĝojn en ŝlimon kaj sablon. La rivero tiam fariĝis simbolo de plagoj kaj mizero. Iuj burĝaj “specialistoj” pesimisme profetis, ke “la Flava Rivero estas nekonkerebla”, kaj “ĝi estas malfeliĉo de Ĉinio”.

Nun, kvankam la rivero muĝas kiel antaŭe, tamen ĝi neniel povas sin liberigi de la kateno de ambaŭbordaj digoj kaj la fluego, kiun oni nomas “kota drago”, estas jungata de la bravaj homoj.

## PERLOJ EN MALLARĜAJ VALOJ

Post fondiĝo de la nova Ĉinio, la Partio kaj la popola registaro tre zorgis la ordigon de la Flava Rivero. Frue en la jaro 1952, kiam nia nacia ekonomio sin trovis en restarigo, Prezidanto Maŭ Zedong jam faris la grandan instrukcion “**Bone aranĝu la Flavan Riveron**”. En la pasintaj pli ol 20 jaroj, sub la direktado de la revolucia linio de



*Nova fizionomio de antikva irigacia kanalo de Ninghia*

Prezidanto Maŭ, la vastaj amasoj de la baseno de la Flava Rivero faris plenan ordigon kaj ekspluaton al la rivero. Precipe post la Granda Proleta Kultura Revolucio la vastaj amasoj de kadroj kaj popoloj ambaŭborde de la rivero energie kondukis akvoutiligan kaj hidroelektran konstruadon kaj starigis kvin grandajn akvoutiligajn pivotajn konstruaĵojn sur la trunka fluo de la Flava Rivero, inkluzive de Liugiahia, Kingtonghia kaj Sanmenhia, kiuj donas elektron, faras irigacion kaj baradon de superakvo kaj glacipecegoj, kio multe akcelis la disvolviĝon de industrio kaj agrikulturo. Nun kiam nokto falas, en montvaloj antaŭe dezertaj ekbrilas sennombraj elektraj lampoj kvazaŭ steloj sur la ĉielo, kiujn oni nomas “perloj en mallarĝaj valoj”.


Krom la supre menciitaj grandaj hidroelektraj, la amasoj de la baseno de la Flava Rivero konstruis ankaŭ milojn da mezgrandaj kaj malgrandaj akvorezervejoj kaj hidroelektraj, disvolvante la spiriton de sinapogo sur propraj fortoj kaj penemaluktado en malfaciloj. Huajuan-brigado de Ĝang-giaĉuan-a Huj-nacia Aŭtonoma Gubernio de Gansu-provinco estas malgranda montvilaĝo ĉe la bordo

de Vejŝuj-rivero, la branĉo de la Flava Rivero. Antaŭe tie malrapide disvolviĝis la agrikultura produkto pro multeco de agro, sed nesufiĉeco de laborfortoj. Poste tieaj popoloj konstruis malgrandan hidroelektron per siaj propraj fortoj, dank’ al kio oni efektivigis mekanikigon de prilaborado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj, kiel degrajnigo, dispecigo, muelado, olepreno kaj aliaj, liberigis laborfortojn kaj rapide disvolvis kampan fundamentan konstruadon kaj agrikulturan produkton. Ankaŭ en ambaŭ bordoj de la relative grandaj branĉoj de la Flava Rivero, nome la riveroj Vuding, Janhe, Ginghe kaj Vejhe aperis nombro da malgrandaj hidroelektraj. La funkcio de tiuj elektraj liveras elektron al dekmil nombraj pumpstacioj de la tuta baseno, tiel ke la fekunda akvo de la Flava Rivero fluas en ebenaĵoj kaj sur la Loesan Altebenaĵoj kaj ŝanĝas fizionomion de sekeco de tiuj lokoj en mil jaroj.

### REJUNIĜO DE LA MALNOVA IRIGACIA REGIONO

La irigacia regiono de la Flava Rivero en Ninhia-a Regiono aspektas kvazaŭ akvolando: tie kanaloj

*Dank’ al intermiksa kulturado de grenplantoj kaj arboj, multe mildiĝas la atako de ventego kaj sablo en Lankaŭ-gubernio.*



interplektiĝas kiel reto, senlimaj rizplantoj ondiĝas en zefiro kaj vicoj post vicoj da ĉielskrapaj poploj kvazaŭ rubandoj sin etendas malproksimen.

La irigacia regiono de Ninhia havas longan historion. Frue antaŭ pli ol 2,000 jaroj, por disvolvi agrikulturan produkton, tieaj laborantaj popoloj jam konstruis la fame konatajn kanalojn Bejdidong kaj Bejdihi ambaŭborde de la Flava Rivero malsupre de la rivergorĝo Kingtonghia kaj poste aliajn tri kanalojn sinsekve, por rekte enkonduki la akvon de la rivero en kampojn.


Tamen en la longa feŭda socio malrapide disvolviĝis tiu regiono. Precipe en la lastaj cent jaroj antaŭ la Liberiĝo, pro kruela ekspluato kaj senbrida rabado de la reakciuloj de Ĉiang Kajŝek kaj militaristoj, pro laŭplaĉa drenado kaj irigacio de bienuloj, kiuj havis rajton disponi teron tie aŭ alie, la stagnanta akvo fariĝis lago kaj grandaj pecoj da fekundaj kampoj — dezertejoj kaj marĉejoj.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio tiu irigacia regiono akiris novan vivon. Sub la gvido de la Partio, la popolamasoj faris planan kaj grandskalan

reformon al la irigacia regiono: ili rektigis zigzagajn kanalojn, rekonstruis difektitajn kulvertojn kaj pontojn, konstruis novajn kanalojn kaj prenis diversajn metodojn por batali kontraŭ inundo kaj salalkalo. Por garantii sufiĉan akvofonton al la irigacia regiono ili konstruis grandan pivotan akvoutiligan konstruaĵon en Kingtonghia, la elfluejo de la Flava Rivero, tiel ke pli ol 200,000 hektaroj da kampoj fariĝis irigaciataj kaj ĉie montriĝas tute nova aspekto.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la vastaj amasoj de huj-oj kaj han-oj kritikis la kontraŭrevolucionan reviziisman linion de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ kaj levis novan tajdon por lerni de Daĝaj en agrikulturo. Ili plie fosis kanalojn, multe klopodis por dreni superakvon kaj forigi salalkalon, kompletigis drenan kaj irigacian konstruaĵojn kaj energie faris longbedajn kampojn plugatajn de maŝinoj, disvolvante kampan fundamentan konstruadon kun reformo de grundo kaj utiligo de akvo kiel centro. Ĝis nun en la irigacia regiono kun longeco de pli ol 300 kilometroj kaj larĝeco

*Angulo de la pivota akvoutiliga konstruaĵo Kingtonghia sur la Flava Rivero*



de dekoj da kilometroj, jam formiĝis 120,000 hektaroj da longbedaj kampoj plugataj per maŝinoj, kiuj garantias stabilan kaj altan produkton. En 1973, la totala produktokvanto de greno de la tuta regiono pliiĝis je ĉirkaŭ 50% kompare kun tiu de 1965, la jaro antaŭ la granda kultura revolucio.

“**Nur socialismo povas savi Ĉinion.**” Tiun veron vivece pruvis la fakto de grandpaŝa antaŭenmarŝo de la regiono.

## NOVA FIZIONOMIO DE LA LOESA ALTEBENAĴO

En la supra kaj meza basenoj de la Flava Rivero troviĝas la Loesa Altebenaĵo plej granda en la mondo. Ĝi estis kovrita de dika tavolo de malkompakta loeso. Pro lavo de pluvegoj en multaj jaroj, sur la vasta Loesa Altebenaĵo formiĝis ondantaj montetoj kaj sennombraj valoj. En kaj ekster la Granda Muro norde de Gansu kaj Ŝenhi estas ankaŭ vasta sabla regiono. De tie miloj kaj miloj da fluejoj portis la forlavitajn sablon kaj teraĵon en la Flavan Riveron. Laŭ statistiko, ĉiujare la sablo kaj teraĵo alportitaj en la Flavan Riveron atingis 1,600 milionojn da tunoj. Tiom granda kvanto da sablo kaj teraĵo facile obstrukcis la fluejon en la malsupra baseno kaj kaŭzis breĉiĝon de la digoj. Nun granda ŝanĝiĝo okazis al la Loesa Altebenaĵo. En tio Vubaŭ-gubernio de Ŝenhi-provinco donas okulfrapan ekzemplon.

En Vubaŭ ĉe la bordo de la Flava Rivero interkruĉiĝas valoj. Tie 98% de 14,000 hektaroj da agro dislokiĝas sur deklivoj. Pro serioza perdiĝo de akvo kaj teraĵo la pohektara produktokvanto de greno estis nur pli ol 300 kilogramoj en ordinara jaro. Sekegeco, krutaj deklivoj kaj profundaj valoj kaŭzis multajn malfacilojn al disvolvo de agrikultura produkto.

La Granda Proleta Kultura Revolucio liberigis la penson de homoj kaj firmigis ilian memfidon pri reformado de la naturo. Vintre de 1970, ĉiuj membroj de la partia komitato de la gubernio venis al Ĉuankou-brigado, kie Prezidanto Maŭ siatempe transveturis la Flavan Riveron orienten, forlasinte nordan Ŝenhi en la lasta periodo de la Liberiga Milito. Tie ili petis veteranan pramiston Hjue Juhaj, kiu en sia tempo veturigis Prezidanton Maŭ trans la riveron, rakonti pri brilaj historiaj aferoj, kaj maljunan kadron rakonti pri la glora tradicio de Vubaŭ-anoj kiuj sekvis Prezidanton Maŭ en revolucio. Ĉiuj ili diris: “En sia tempo Vubaŭ-anoj brave batalis unu sekvante alian por la venko de la revolucio, ĉu ni povas submetiĝi al la mal-

faciloj nun? Ne! Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio zorgas nin kaj la popolo de la tuta lando subtenas nin, kaj ni nepre devas disvolvi la Jan-an-an spiriton de penema lukto en malfaciloj, plene mobilizi amasojn por ŝanĝi la postĝintan fizionomion.” Post tio vigle disvolviĝis la batalo por reformi la montojn kaj riverojn de Vubaŭ. En la lastaj kvar jaroj de 1970, la areo de nove faritaj ŝtuparaj kaj irigaciataj kampoj kaj kampoj sur digoj okupis pli ol 50% de la totala areo de agro. Tiuj kampoj plus la areo plantita per arboj kaj herboj, kiuj povas regi perdiĝon de akvo kaj teraĵo, okupis 43% de la totala areo de la regiono. En 1973, tie okazis granda sekeco, tamen la totala produktokvanto de greno pliiĝis je 30% kompare kun la plej alta produkto en la historio kaj je 1.5-oblo superplenumis la taskon de vendo de greno al la ŝtato. Ĉijare ili refoje venkis sekecon kaj akiris bonan rikolton. Pro tio Vubaŭ estas glorie nomata “Daĝaj en norda Ŝenhi”.

## NOVAJ ATINGOJ AMBAŬFLANKE DE LA GRANDAJ DIGOJ

Tra altaj montoj kaj mallarĝaj valoj en sia supra kaj meza basenoj, la Flava Rivero eniras en la Nord-ĉinian Altebenaĵon proksime de Ĝengĝou de Henan-provinco. Bridate de la grandaj digoj la furioza riverakvo obeeme fluas malproksimen. Dank’ al riparo la digoj de la Flava Rivero fariĝis tre fortikaj, ĝiaj supraj partoj estas larĝaj kaj ebenaj kaj plenkovritaj de densaj kaj prosperaj herboj kaj arboj. Kvazaŭ grandaj muroj sur akvo kaj verdaj forstozonoj ili etendiĝas pli ol 1,800 kilometrojn. Ili estas fruktoj de diligenta laborado de kelkcent mil popolanoj de Henan kaj Ŝandong dum vintroj kaj printempoj en la pli ol 20 jaroj.

En iuj facile breĉitaj digpartoj oni masonis sume pli ol 5,000 altajn kaj grandajn digojn per 10,000,000 kubmetroj da ŝtonoj, kiuj paralele etendiĝas en riveron por bari la torenton.

La vastaj amasoj ambaŭborde de la rivero plantis arbojn kaj herbojn ambaŭflanke de la digoj por malhelpi eroziĝon de grundo. La arboj kaj herboj povas ne nur firmigi la digojn, sed ankaŭ liveri materialojn por riverordigo kaj konstruado de la ŝtato kaj la kolektivo.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio, la popolanoj kaj laboristoj de la malsupra baseno kreis novan metodon en firmigado de la digoj per ŝlimo de la Flava Rivero, t.e. ili enkondukas la riverakvon en malaltajn zonojn dorse de la digoj por altigi kaj larĝigi la digojn per ĝia sedimento




kaj poste enkondukas la klaran akvon en kampojn. Tio ne nur preventas obstrukcon al riverujo, sed ankaŭ fortigas la digojn. Nun tian laboron oni jam faris en la dorso de pli-ol-300-kilometra parto de la digo. La sedimento ordinare altas je 2 metroj kaj en iuj partoj ĝi eĉ atingis kvin metrojn.

La popolanoj de la malsupra baseno ne nur fundamente venkis la katastrofojn de miloj da jaroj, sed ankaŭ utiligas la akvon kaj sablon de la rivero en transformado de la fizionomio de ambaŭ bordoj de la Flava Rivero.

La 11 regionoj kaj urboj de Henan kaj Ŝandong ambaŭborde de la malsupra baseno de la Flava Rivero estis ofte atakitaj de sablo, inundo kaj salalkalo en la historio pro ofta breĉiĝo de la Flava Rivero. Tiam oni priskribis la tieajn katastrofojn per jenaj vortoj: “en printempo vidiĝas blankeco, en somero vasta maro, en aŭtuno velkiĝas plantoj kaj en vintro mankas greno kaj hejtaĵo”. Nun la terpecoj antaŭe plenkovritaj de sablo kaj salalkalo jam fariĝis densaj forstozonoj, fekundaj kampoj kaj fruktoĝardenoj. La lagetoj kaj marĉejoj kaŭzigitaj de inundo pro breĉiĝo de la Flava Rivero transformiĝis en rizkampojn. Ĉio ĉi tio ŝuldas konstruon de 179 akvokondukaj kaj akvolevaj konstruaĵoj en la malsupra baseno. Nun la areo de irigaciataj kampoj de la tuta baseno jam atingis pli ol 3 milionojn da hektaroj.


Lankaŭ-gubernio situanta en ebenaĵo de la orienta Henan estas centro de la malnova fluejo de la Flava Rivero kaj estis loko plej multe suferanta de inundo, sablo kaj salalkalo en la pasinteco. De la granda kultura revolucio, preninte Daĝaj-anojn kiel ekzemplojn, la popolanoj de Lankaŭ elmetis batalan sloganon “La Flava Rivero mem pagu ŝuldojn”. Ili plantis arbojn sur dezertaj sablejoj kaj salalkala tero kaj kondukas riverakvon por irigacio, tiel ke 260 grandaj sablejoj fariĝis prosperaj forstozonoj, sur 34,000 hektaroj da kampoj estis efektivigita miksa plantado de agrikulturaj plantoj kaj arboj, kaj 14,000 hektaroj da salalkalaj kampoj fariĝis fekundaj kampoj dank’ al sedimentiĝo de la Flava Rivero. Nun ili fundamente venkis inundon, sabloventon kaj salalkalon. En 1973, la produktokvanto de greno kaj kotono de la gubernio atingis respektive la plej altan nivelon de la historio. Ĉijare ilia produktokvanto havos ankoraŭ pli grandan kreskon.


La Flava Rivero, kiu antaŭe alportis al la ĉina popolo grandajn suferojn kaj estis rigardata de iuj en- kaj ekster-landaj burĝaj kleruloj “nekonkerebla” rivero, nun estas reformata en la socialisma nova Ĉinio por ke ĝi favoru al la popolo.



*Granda konstruaĵo de elektra irigaciado en Ŝandong per akvo de la Flava Rivero*

*Ŝtuparaj kampoj sur la Loesa Altebenaĵo*





## ĈANG JING

**S**UR la scenejo radias matenruĝo kaj flirtas koloraj flagoj; tondras tamtamado kaj tamburado ĉe Huangpu-rivero, kaj ĝojkrias homoj. En la melodio *Ruĝas la Oriento*, la nove konstruita dekmil-tonela ŝipo glitas de sur la ŝipglitejo al la rivero. Kun longa fajfado de la ŝipo, leviĝas huraoj kaj falas la teatra kurteno. Ĉe tio kunfluiĝas en la teatro aklamoj kaj aplaŭdoj sur kaj sub la scenejo.

Konstrui dekmil-tonelan ŝipon sur malgranda ŝipglitejo estis iniciato de la ŝanhajaj ŝipkonstruaj laboristoj en la granda kultura revolucio. Artistoj de Ŝanhajo surscenigis tiun kortuŝan aferon antaŭ nelonge.

Antaŭvespere de la 25-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la Kultura Grupo de la Ŝtata Konsilantaro aranĝis en Pekino la festivalon, en kiu partoprenis la artaj kaj literaturaj laborantoj de Ŝanhajo, Guanghi, Hunan kaj Liaŭning. Ili prezentis riĉenhavajn kaj diversformajn programerojn por la ĉefurbaj spektantoj. *Batalo sur Ŝipglitejo* estas unu el la bonaj programeroj ŝatataj de la amasoj. Tiu ĉi festivalo estis alia revuo de novaj fruktoj de nia proleta literatura kaj arta revolucio post la printempa arta festivalo de Norda Ĉinio.

La Granda Proleta Kultura Revolucio estas profunda revolucio en la politika kaj ideologia sfero. En Ĉinio senĉese aperas novaj socialismaj aferoj, kio servas kiel neelĉerpebla fonto por la revoluciaj literaturo kaj arto. Observante la instruon de Prezidanto Maŭ Zedong, ke literaturaj kaj artaj laborantoj devas profundiĝi inter la amasojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj en praktikon de klasbatalo, la artistoj de Ŝanhajo, Guanghi, Hunan kaj Liaŭning en la lastaj kelkaj jaroj memkonscie iras la vojon de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj kaj entuziasme priokantas novajn homojn kaj novajn pensojn, tiel ke multaj novaj verkaĵoj aperas en diversaj formoj. Tio manifestas prosperecon de niaj socialismaj literaturo kaj arto. La dramo *Batalo sur Ŝipglitejo* verkita kaj ludita de la Ŝanhaja Drama Ensemblo estas bona teatraĵo, kiu varme priokantas la grandan kulturalan revolucion. Kvankam ĝi rakontas nur pri la ŝipkonstruado, tamen ĝi relative profunde esprimas heroecon de la ĉina laboristaro, kiu diligente laboras por potenciĝo sin apogante sur la propraj fortoj en disvolvo de industrio dum senĉesa batalo kontraŭ la klasaj malamikoj kaj la reviziisma linio.

Ĉinio estas vasta lando kun multaj nacioj, tial ĝi havas multajn lokajn operojn inkluzive tiujn de

nacimalplimultoĵoj. Dum la festivalo oni prezentis naŭ specojn de lokaj teatraĵoj lernitaj kaj adaptitaj el la revoluciaj modelaj teatraĵoj kaj aliaj spegulantaj la aktualan vivon. La amasoj ĝoje vidis, ke tiuj lokaj teatraĵoj, precipe tiuj adaptitaj el la revoluciaj modelaj teatraĵoj, aperas en tute nova fizionomio sur la literatura kaj arta scenejo.

La revoluciaj modelaj teatraĵoj estas grandaj fruktoj akiritaj en plenumo de la principoj de Prezidanto Maŭ Zedong **“Utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo, utiligi fremdlandajn en servo al Ĉinio”**, kaj **“forigi la malnovajn kaj elŝovi la novajn”**. La modelaj pekinoperoj, baletoj kaj simfonioj polure modlis multajn heroojn de la proletaro, kiuj jam fariĝis bonaj ekzemploj lernindaj por la ĉina popolo. La lokaj teatraĵoj diversforme adaptitaj el la revoluciaj modelaj operoj re-surscenigas tiujn heroojn, tio estas postulo de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj ankaŭ efika rimedo por reformi la lokajn teatraĵojn de nia lando laŭ la vojo malfermita de la pekinopera revolucio antaŭ dek

jaroj. La Hunan-a huagu-opero *Ŝagiabang* lernita de kaj adaptita el la samtola pekinopero akiris ĝojindan sukceson ĝuste en tiu reformado kaj ricevis varman bonvenigon.

Huagu-opero havas historion de pli ol 200 jaroj. En la pasinteco ĝi prezentis nur familiajn konfliktojn kaj similajn aferojn kun malforta kaj pala kanttono. Sed nun ĝi jam povas prezenti heroojn de la proletaro per forta kaj alta kanttono. La profunda ŝanĝiĝo al huagu-opero estas atribuita al diligentaj laboroj de la Hunan-aj artistoj. Por esprimi la revolucion politikan enhavon kaj krei heroojn de la proletaro ili lernis la sperton pri la kreado de revoluciaj modelaj teatraĵoj, forigis mankojn de malnova huagu-opero pri ĝiaj flirtema kanttono kaj simpla melodio kaj projektis multajn novajn kantojn, kiuj tenas siajn lokajn trajtojn kaj samtempe havas multajn novajn kreojn. Ankaŭ Ŝanhajo, Guanghi, Hunan kaj Liaŭning prezentis siajn proprajn lokajn teatraĵojn kaj per tio faris utilajn provojn kaj akumulis spertojn en kreado kaj refor-

### *Ĝuang-nacia opero* Batalo sur Ebenajo





*Dramo Batalo sur Ŝipglitejo*

mado de la kantado. Tio estas bona komenco de la revolucio de lokaj teatraĵoj de nia lando.


Dum la festivalo estis prezentitaj la novaj teatraĵoj spegulantaj la historion de la revolucia batalo de la ĉina popolo kaj ĝian socialisman aktualan vivon sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ. Ekzemple, la Ŝanhaja Pekinopera Trupo prove prezentis tri revoluciajn modernajn pekinoperojn: grandtipa teatraĵo *Panŝivan* priskribanta unuĝan batalon de la popolo kaj armeo ĉe la marfronto por komplete ekstermi malamikajn spionojn; *Pridemandi Seĝon* spegulanta la klasbatalon en la kamparo; kaj *Batalo kontraŭ Ondo* montranta la sinforgesemon de fiŝkaptaj laboristoj en savado de fiŝistoj falintaj en maron. La pekinopero *Printempo de Jaŭ-aj Montoj* ludita de la Pekinopera Trupo de Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono priskribas ekstermadon de banditoj en Guanghi je la komenca periodo post la Liberiĝo. Unuakta dramo *Ĉefa Leciono* prezentita de Guanghi rakontas, kiel malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj faras edukon pri la klasbatalo kaj la dulinia batalo al la intelektaj junuloj venintaj el urboj, por ke ili sane kresku en la kamparo. La dramo *Fengŝuvan* prezentita de Hunan brile bildigas la grandiozan

kamparanan movadon en Hunan dum la jaroj 1926-1927. Ĝi priskribas la akran batalon inter la du klasoj kaj inter la du linioj en la kamparana movado siatempe, kaj malkovris per tio la grandan veron, ke **“el pafilo venas la ŝtatpotenco”**.

*Kantserio pri Batalo ĉe Hiŝa-insularo* prezentita de Liaŭning dum la festivalo estis relative bona muzikaĵo. Ĝi estis adaptita laŭ la raportaĵo en versoj *Batalo ĉe Hiŝa-insularo* verkita de Ĝang Jongmej, kiu estis aperigita en *EPC* n-roj 6-8, 1974. La verkintoj de la kantserio elektis kelkajn scenojn el la originalo laŭ la postulo de karakteroj de kanto kaj muziko, kaj koncentre modlis la tri figurojn de militŝipestro, maljuna ŝipestro kaj soldato. En la kreado oni kombinis lirikecon kun rakontado, sed aplikis la lirikan esprimmanieron kiel la ĉefan por montri noblan spiriton kaj grandan idealon de la herooj. La sonora kantado kaj forta melodio kvazaŭ portus sur la belan kaj riĉan insularon la spektantojn, kiuj celebrus la venkon kune kun la armeanoj kaj popolanoj de Hiŝa. *Kanto de Arbohakistoj* ludita de Guanghi estas danco, kiu priskribas la vivon de arbohakistoj. La verkintoj de la danco multfoje profundigis en arbaran regionon por sperti la vivon. Kaj fine ili ekstraktis la dancmovojn bone esprimantajn la

arbohakadon, tiradon kaj flosadon de arbotrunkoj. La danco sukcese montras sinforĝesan laboron kaj revolucionan optimismon de arbohakistoj por dediĉi lignon al la patrolando.

La unumonata arta festivalo montris prosperecon sur la literatura kaj arta scenejo de la socialisma Ĉinio sub puŝado de la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio. Tiuj novaj programeroj spegulas la batalan vivon de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreis iliajn heroajn figurojn kaj ricevis varman bonvenon de amasoj. La revolucia literaturo kaj arto kuraĝigas la ĉinan popolon por akiri novajn venkojn en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj kuraĝigas ankaŭ niajn literaturistojn kaj artistojn por krei pli multajn kaj pli bonajn verkojn por ke la socialisma arto floru pli bele.



*Hunan-aj artistoj prezentas huagu-operon al la komandantoj kaj batalantoj de iu fervoja trupo.*

### Kantserio pri Batalo ĉe Hiŝa-insularo



# Multesperiga juna generacio

**L**A Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio en Ĉinio hardis junan generacion. La sana kreskado de granda nombro da junaj partianoj de Hijang-gubernio de Ŝanhi-provinco plene pruvis, ke la afero de nia Partio prosperas kaj havas siajn daŭrigantojn.

En la arda movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo la multesperiga juna generacio, starante sur la fronto de klasbatalo kaj linia batalo, kune kun amasoj batalas kontraŭ reviziisma ideologio kaj kapitalisma tendenco kaj ĝisfunde rompas kun malnova tradicia koncepto. Fronte al malfaciloj kaj danĝeroj ili kuraĝe elpaŝas unuavice en batalo kaj pretas oferi ĉion sian al la socialisma afero. Ili kuraĝas pensi, agi kaj preni sur sin pezan taskon por la revolucio.

Rigardante tiujn junajn vivecplenajn komunistojn, Vang Hiaŭhaj, sekretario de la partia filio de Dongĝaj-brigado, laŭdis: “Kvazaŭ lokomotivo plenvapora, ili impete antaŭenkuras.”

Ankaŭ Nie Fulian, 58-jara partiano de Anping-brigado, laŭdis: “Ni havas tiajn bonajn posteulojn en la brigado, kio tute trankviligis min!”

## PRENI REVOLUCIAN TASKON SUR SIN

Hijang-gubernio havas 411 sekretariojn de la brigadaj partifilioj, el kiuj 120 estas ĉirkaŭ 25-jaraj partianoj aliĝintaj en la granda kultura revolucio. Inter la kadroj troviĝas 24-jara sekretario de partia komitato de komunumo kaj malpli-ol-20-jara produkta grupestro. Tiuj junaj partianoj estas plenergiaj kaj kuraĝas preni sur sin pezan revolucionan taskon en la diversnivelaj gvidantaroj konsistantaj el maljunaj, mezaĝaj kaj junaj kadroj.

En la partifilio de Daĝaj-brigado troviĝas naŭ membroj, el kiuj kvar estas junuloj, kaj 27-jara partiano Guo Fenglian funkcias kiel sekretario de la partifilio. En iu kunveno de partifiliaj komitatanoj en decembro de 1973, Ĉen Jongguj, tiama sekretario de la partifilio, diris: “Nia Partio estas vigle plena kaj havas siajn daŭrigantojn, la sama estas nia Daĝaj-a partifilio.” Li proponis, ke oni elektu Guo Fenglian kiel sekretarion de la partifilio. Ĉiuj aliaj membroj esprimis sian aprobon. En la lastaj jaroj oni propraokule vidis kreskon de Guo Fenglian en la klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado. Ŝi estis sinsekve elektita kiel estrino de la grupo de feraj knabinoj, kiel sekretario de la filio de la Komunisma Junulara Ligo de la brigado kaj kiel vicsekretario de la partifilio. Ĉiuj laŭdis, ke Guo Fenglian estas bona gvidanto. La lasta emocie esprimis sian decidemon al la aliaj komitatanoj: “Mi nepre gvidos la Daĝajajn komunumanojn daŭre antaŭenmarŝi laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.”

Tuj post kiam ŝi laboris kiel sekretario de la partifilio, ŝi kune kun amasoj sin ĵetis en ardan movadon de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio. Ŝi diligente studas marksismon kaj leninisman kaj la verkojn de Prezidanto Maŭ, ligante la lernitan teorion kun reala klasa batalo kaj multfoje organizis kunvenojn kritikajn kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio. En iu kritika kunveno en februaro ĉijare, la indigna kritiko de komunumanoj kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio multe pensigis ŝin pri la mizera historio de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Daĝaj antaŭ la Liberiĝo, pri reakcia programo de Konfucio “sin regi por restarigi la etiketon”, pri restaŭra aktivado de bienulo Gia Deng-juan post la agrara reformo kaj pri kontraŭrevolucia intrigo de Liu Ŝaŭki kaj Lin



*Gia Cunsuo, sekretario de la filio de la Komunisma Junulara Ligo de Daĝaj-brigado, kune kun gejunuloj skribas dazibaŭojn kritikantaj Lin Biaŭ kaj Konfucion.*

Biaŭ. Ĉe tio ŝi indigne starigis kaj faris fortan kritikon al kontraŭrevolucia krimo de Lin Biaŭ kaj Konfucio.

La granda revolucia kritiko vekis ĉe la Daĝaj-anoj pligrandan energion. En printempo ili venkis seriozan sekegecon kaj antaŭdate plenumis la taskon de printempa semado. Somere, ili venkis la katastrofon de granda vento, tiel ke la agrikulturaj plantoj en vasta areo bone kreskis. Sub la gvido de nova gvidantaro la Daĝaj-anoj akiris alian riĉan rikolton!

Sub la sunbrilo de Maŭzedongpenso, nombro da junaj daŭrigantoj same kiel Guo Fenglian sane kreskas.

Inter 11 partifiliaj komitatanoj de Dongfengĵen-brigado troviĝas sep pli-ol-20-jaraj junaj partianoj. 25-jara Ĝang Hilu laboras kiel sekretario. Laborante sur la gvida posteno, Ĝang Hilu unue prenas klasbatalon kiel sian ĉefan laboron. En streĉa batalo kontraŭ sekegeco, iu fiulo intencis subfosi tiun laboron, kaj li tiam mobilizis amasojn al la batalo kontraŭ la fiulo, por ke la amasoj ĉiam memoru fundamentan linion de la Partio.

Kiam plenmano da klasaj malamikoj neis movadon de lerno de Daĝaj en Hijang-gubernio, juna vicsekretario de la partifilio Ĝang Gujhiang de Ŝiping-brigado vokis junulojn kaj maljunajn malriĉkamaranojn al kunsido kaj elmetis la demandojn:

“Ĉu ni ne devas lerni de Daĝaj en agrikulturo?”  
 “Kial iuj homoj kalumniis ke niaj paŝoj estas tro grandaj?” El sia lernado de Daĝaj ili konis, ke lerni de Daĝaj en agrikulturo estas brila vojo montrita de Prezidanto Maŭ. Ne tro rapide ni iris sur tiu vojo, sed iuj fiuloj intencis restarigi kapitalismon! Tial ili organizis kunvenojn por kritiki la kontraŭrevolucionan reviziisman linion de Lin Biaŭ, tiel ke pligrandiĝis iliaj paŝoj en lernado de Daĝaj en agrikulturo.

## ĈION POR KOLEKTIVO

En Hijang-gubernio cirkulas multaj kortuŝaj rakontoj pri sinforĝesa laboro de junaj partianoj por kolektivo.

Somere, montdiluvo kaŭzita de pluvego breĉis la digon de nove konstruita akvorezervejo de Dongfengĵen-brigado de Ĝaŭbi-komunumo, kaj la akvorezervejo estis baldaŭ detruota. En tia danĝera momento, junaj partianoj unue saltis en akvon kaj ilin sekvis ankaŭ dekelkaj junuloj. Ili baris la akvon antaŭ la breĉita loko per sia korpo. Dank’ al ilia klopodado estis sekurigitaj la ŝtona digo kun longeco de 60 metroj, la akvorezervejo kun kapacito de 200,000 kubmetroj, la vivo kaj posedaĵoj de dekelkaj familioj loĝantaj malsupre de la akvorezervejo kaj pli ol 20 hektaroj da agro.

En la lasta stadio la dragado de Nanhe-rivero farita de Anping-brigado de Anping-komunumo


estis plej malfacila kaj plej streĉa. Juna partiano Li Ginguj malmulte dormis en ok tagnoktoj. Kvankam liaj okuloj jam ruĝiĝis, tamen li ne volis forlasi la konstruejon. La sekretario de la partifilio ŝlosis lin en ĉambro por ke li bone dormu, sed, en la sekvanta tago oni malfermis la pordon kaj trovis ke li ne estis en la ĉambro kaj la fenestro estis malfermita. Li Ginguj ree laboris unu nokton!

Iun tagon de somero, 1973, la krano de la amoniako-tenejo de Bogiaŭ-brigado de Gaŭluo-komunumo subite difektiĝis. La amoniako elŝprucis tra la fertubo kun dikeco de dek centimentroj, tial sub la tubo stagnis multe da amoniako. La perdo de amoniako de la brigado tre maltrankviligis la komunumanojn.

En tiu ĉi ŝlosila momento, 25-jara nova partiano Li Hiŝun tuj depuŝis retenantojn kaj vadis en amoniako kaj ŝtopis la truon per la blanka lavtuko deŝirita de ĉirkaŭ sia kolo.

Pro tio, la haŭto de liaj du kruroj kaj du piedoj estis difektita de amoniako. Ĉiuj maltrankviliĝis pro li. Sed, Li Hiŝun diris: "En la pasinteco, multe da revoluciaj batalantoj oferis sian vivon por la proleta revolucia afero. Hodiaŭ mi estas nur vundita je la haŭto por protekti kolektivian amoniakon, tio estas nenio."

*Gaŭ Sutang (la kvara de maldekstre), la partifilia vicsekretario de Nansihian-brigado de Gaŭbi-komunumo, kune kun komunumanoj kritikis la absurdaĵon "la viroj estas noblaj, kaj la virinoj — plebaj", dis-trumpetitan de Lin Biaŭ kaj Konfucio.*



## KURAĜI POR HAKI NOVAN VOJON

En Hijang-gubernio, kiuj estas plej kuraĝaj en penso kaj ago, kiuj estas kun malplej multe da konservativemo en penso kaj kuraĝas elhaki novan vojon? Estas multnombraj vivecplenaj junuloj kun junaj komunistoj ĉe la fronto.

Sed, ili renkontis multajn malfacilojn sur sia vojo.

En vintro de 1970, komunisto Vang Gjuvej, sekretario de la filio de Komunisma Junulara Ligo de Vugiaping-brigado de Daĝaj-komunumo kune kun kelkaj junaj komunistoj prezentis proponon provkulturi rizon, pri kio oni havis malsamajn opiniojn. Iuj diris: Kiel ni povas kulturi rizon, kiam ĉe ni ankoraŭ ne troviĝas rizkampo? Tio estas deliraĵo!"

Vizaĝe al la akra batalo inter la du opinioj, Vang Gjuvej organizis junulojn ripete studi la verkon de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko*. La trovita solvo estas praktiko! En profunda nokto, li kaj kelkaj junuloj skribis sian peton al la partifilio kaj proponis al ĉiuj komunumanoj: "Ni prenu Daĝaj kiel ekzemplon kaj iru novan vojon. Ni nepre kulturos rizplantojn en Vugiaping-brigado!" Sub la firma subteno de la partifilio kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, oni konstruis rizkampon kun areo de 0.17 hektaro sur la suda bordetendaĵo plena de ŝtonetoj.

Komenciĝis provkulturado de rizplantoj. Vang Gjuvej aĉetis broŝuron pri kulturo de rizplantoj kaj diligente studis. Li pensis: "Havante akvon, oni do kreskigos rizplantojn." Sed, dekkelkajn tagojn post la transplantado, rizidoj ekflaviĝis. Li kune kun la kunuloj serĉis la kaŭzon kaj fine trovis, ke nur rizidoj starantaj en pliprofunda akvo estas flaviĝantaj. Tial ili malmultigis akvokvanton de la kampo kaj fine akiris sukceson. Post kvin tagoj la flavaj rizidoj ekverdiĝis. En praktiko ili trovis la kreskajn leĝojn kaj plantajn metodojn de rizo en tiu loko.

Aŭtune, oni akiris riĉajn rikoltojn de rizo sur tiu ĉi eksperimenta kampo.

Sed, ili ne haltis post la sukceso. Sian sperton ili tuj disvastigis. En la lastaj jaroj, rizkampa areo de Vu Giaping-brigado vastiĝis jaron post jaro. En la kuranta jaro ĝia areo jam atingis 16 hektarojn. Nun ili klopodas por atingi produkton de 9 tunoj da rizo pohektare kaj per tio faros pli grandan kontribuon por la ŝtato.



## eliminis narkotismon?

**N**ARKOTISMO estis landskala plago por malnova Ĉinio, kiu havis 10 milionojn da uzantoj de opio, morfino kaj heroino.

En 1952, la tria jaro de sia fondiĝo, la Ĉina Popola Respubliko jam komplete elradikis tra la tuta lando escepte de Tajvan-provinco narkotismen, kiu malutilis al la popolo preskaŭ 200 jarojn. Nun, la juna generacio naskiĝinta en nova Ĉinio neniam vidis, kia estas opio. Ili, kiuj estas ŝarĝitaj per la grava tasko konstrui socialismon, povas sane kreski kaj maturiĝi tiel en menso kiel en korpo.

En tiu ĉi artikolo ni klopodos respondi la demandon, kiun prezentas ĝia titolo.

Origine, Ĉinio ne produktis opion, kiu estis enportita unue de imperiistoj al Ĉinio ekde la 70-aj jaroj de la 18-a jarcento. Tio renkontis siatempe fortan kontraŭstaron de la ĉina popolo. Sed, la imperiistoj subaĉetis ĉinajn koruptitajn burokratojn kaj daŭre enportadis ŝtele kaj kontrabande opion en Ĉinion en tre grandaj kvantoj. Poste por ekspansiigi la opian komercadon, la imperiistoj eĉ lanĉis la fifaman "malpuran militon" — la Opian Militon — kontraŭ Ĉinio en 1840-1842. Dum la 13 jaroj ĝis 1900, ili importis en Ĉinion meznombro pli ol 60,000 tunojn da opio kun valoro de pli ol 30,000,000 ĉinaj uncoj (proksimume 1,120 tunoj) da arĝento ĉiujare, kaj la fremdlandaj opio-komercistaĉoj akiris el tio grandegan profiton.

Ekde la imperiisma agreso al Nordoriento de Ĉinio en 1931, la invadintaj imperiistoj praktikis al la loĝantaro en la okupitaj regionoj planitan venenigon de la ĉina popolo per opio, heroino kaj aliaj venenaĵoj, tiel ke la narkotismo vaste etendiĝis.

Kuomintangaj burokratoj komplotis kun imperiistoj, lokaj friponoj, narkotaĵ-vendistoj kaj spekulistoj por organizi narkotaĵ-komercadon kaj transportan reton de opio. Estis uzataj eĉ aviadiloj kaj militŝipoj por transporti opion al diversaj lokoj de la lando kaj akiri por si profitojn. En malnova

Ĉinio sub la regado de Kuomintango, la ĉefo de polico en Kantono estis mem unu el la ĉefoj de narkotaĵa komerco. En koluzio kun bienuloj, kuomintangaj burokratoj devigis kamparanojn kulturi opiopapavojn, de kiuj ili kolektis pezajn impostojn por plenigi siajn proprajn poŝojn. Kaj la plenmano da burokratoj, kuomintangaj politikaj apaĉoj kaj militaristoj estis mem grandaj opiomanuloj.

Post la fondiĝo de nova Ĉinio en la jaro 1949, la popola registaro prenis la eliminadon de narkotismo kiel gravan taskon. Kontraŭ-narkotismaj Komitatoj estis starigitaj sur diversaj administraj niveloj de la centra instanco ĝis la gubernio. Opiaj fumejoj, funkciantaj ĉie en la lando antaŭ la Liberiĝo, ĉiuj estis tuj likviditaj, kaj iliaj laborantoj instalitaj sur aliajn laborpostenojn. La narkotaĵ-komerco, kiel fonto de personaj profitoj kaj de impostoj por la reakciaj regantoj antaŭ la Liberiĝo, estis tuj malpermesita. Opiaj fumiloj, grandaj kvantoj da opio kaj aliaj narkotaĵoj estis bruligitaj en amaskunvenoj en diversaj lokoj.

La popola registaro publikigis plie edikton malpermesantan opiofumadon kaj regularojn por rigore malpermesi fumadon, kontraŭleĝan kultivadon kaj komercadon de opio. Hodiaŭ ĉiaj narkotaĵoj povas esti uzataj nur por medicinaj kaj sciencaj celoj. La specoj de narkotaĵoj, iliaj produktado, provizado kaj uzado estas metitaj sub la unuecan kontrolon de higienaj instancoj; neniu alia organizo aŭ individuo rajtas ilin kulturi, fabriki aŭ vendi.

Ĉiuj narkotaĵoj bezonataj en la tuta lando estas provizataj nur de ŝtata Ĉina Farmacia Kompanio sola. Tiuj narkotaĵoj estas uzataj nur sub preskribo de doktoro.

La sukceso de eliminado de narkotismo ŝuldas ĉefe al plena, profunda mobilizo de la amasoj kaj, sub ties apogo, disvolvo de amasa movado kontraŭ narkotismo, krom uzado de diversaj administraj

rimedoj. Tiu laboro konformas komplete al la interesoj de la popolo.

En tiu movado, ĉiuj lokoj utiligis gazetaron kaj formojn de karikaturado, surstrata teatroludo k.a. por fari vastan propagandon kaj edukadon rilate al elimino de narkotismo. La registaro pacience deadmonis kutimiĝintojn de opifumado kaj instigis ilin dekutimiĝi de fumado en la limigita tempo. Por helpi ilin, la registaro starigis speciale senpagajn kuracejojn kun necesaj litoj kaj medikamentoj. Multaj ricevis tie kuracajn helpojn dum 12 tagoj sub fervora zorgado de doktoroj kaj flegistinoj. Kiam ili forlasis la lokon post dekutimiĝo, ili fariĝis aktivuloj en la kontraŭopia movado. Per siaj doloraj spertaĵoj suferitaj en la malnova socio, ili admonis kaj helpis aliajn opifumantojn por dekutimiĝi de la narkotaĵuzado, kaj krome, aktive malkovris kaj denunciis opiokomercistojn al la popola registaro.

En la kamparo de malnova Ĉinio, la feŭdaj fortoj estis intime kunligitaj kun papavokulturado kaj opia komercado. Laŭ statistiko de iu gubernio en orienta Siĉuan-provinco antaŭ la Liberiĝo, la kulturado de opiopapavoj estis plejparte entreprenata de bienuloj kaj lokaj despotuloj, kiuj pro profitemo dungis aŭ devigis kamparanojn tion fari. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko kamparanoj emancipiĝis dank' al la agrara reformo; ili varme apogis la kontraŭopiajn ediktojn kaj regularojn publikigitajn de la registaro kaj transformis la kampojn de opiopapavoj de bienuloj en tiujn de grenoj kaj ekonomiaj plantoj.

La ĉina popolo jam renversis la regadon de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo, kaj starigis socialisman sistemon. La ŝanĝiĝo de socia sistemo kaj konsciiĝo de la popolo defundamente garantiis la sukcesan eliminadon de narkotismo.

### Ĵus aperintaj esperantaj eldonaĵoj:

85E Es-117 **Hodiaŭa Tibeto** (albumo)

122 pĝ. 23 × 26cm. bind. kaj broŝ.

Prezroj: bind. (s) £0.56 US\$1.55

broŝ. (p) £0.51 US\$1.45

88Es-85p **Sun Vukong Trifoje Batis Skeletospiriton** (bildrakonto)

120 pĝ. 17 × 25cm.

Prezroj: £0.13 US\$0.35

88Es-116p **Antaŭ kaj post Ŝtormo** (infanlibreto)

36 pĝ. 18.5 × 20.5cm.

Prezroj: £0.08 US\$0.20

88Es-119p **Malgrandaj Plantidgardantoj** (infanlibreto)

22 pĝ. 18 × 20.5cm.

Prezroj: £0.06 US\$0.15

**Distribuanto: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Pekino, Ĉinio.**

**Abonu ĉe lokaj agentejoj aŭ rekte ĉe Guozi Shudian, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.**

# La tutlanda popolo unuanime marŝas antaŭen sur la socialisma vojo



Laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kantas kaj dancas por ĝoje celebri la 25-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.

Diversnaciaj popo-  
lanoj partoprenan-  
taj la festajn akti-  
vadojn









Nokto de Pekino en la Nacia Festo




Ŝipglitejo en nokto


La unua ĝetkajo por 50,000-tonela ŝipo de la haveno Ĝangiang de Ĉinio








Če fornego



Petrolrafinejo en nokto




Nove konstruita hidro-  
elektrejo Kingtonghia

Atentema manipulado





Ĝi ŝipon per di-  
a lokomotivo  
prikita de nia  
ndo mem



Nove fabrikitaj  
raktoroj

# LUSIN—revoluciulo kiu senkompromise

## batalis kontraŭ Kong-butiko

**K**ONFUCIO estis reakcia antikva politikistaĉo en la lasta periodo de la ĉina sklava socio kaj proparolanto de la sklavposedantaj aristokratoj. En la tempo, kiam la sklava socio ĉiam pli dekadencis, li plenergie defendis la sklavisman regadon starigitan ekde dinastio Jin tra tiu de Ĝoŭ kaj distrumpetis kompletan sistemon da reakciaj pensoj kaj politikaj tezoj por apogi la malnovan reĝimon. Ĉar la esenco de lia penso estis restarigo de antikva sistemo kaj opono kontraŭ reformado, la ekspluatitaj klasoj kaj reakciaj regantoj de ĉiuj dinastioj ĉiam kultis Konfucion kiel sanktulon, kiun neniu devas profani, por trompi la amasojn kaj korodi la popolon, celante sekurigi aŭ restarigi la malnovan sistemon. Dume, por renversi la malnovan sistemon kaj kritiki la malnovan mondon, la laboranta popolo devas nepre faligi la idolon Konfucion. Tial, dum pli ol du mil jaroj ĉiam iris akra batalo inter kulto al kaj opono kontraŭ Konfucio en la ideologia sfero.

Prezidanto Maŭ diris: **“Lusin estis homo kun plej malmolaj ostoj kaj sen ombreto da sklava mieno aŭ flatemo; kaj tio estas la plej valora kvalito por la koloniaj kaj duonkoloniaj popoloj.”** Tiu kvalito lia speguliĝis ankaŭ en lia batalo kontraŭ Konfucio mem kaj kontraŭ kultado al li. Lusin, **“la plej granda kaj la plej kuraĝa standardportanto de tiu ĉi nova kultura forto”**, estis revoluciulo, kiu senkompromise batalis kontraŭ Kong-butiko. Kontraŭ tiu obstina citadelo de malnovaj penso, kulturo, tradicio kaj kutimoj regintaj jam milojn da jaroj en Ĉinio, li faris longan, daŭran kaj persistan bataladon. Kiam Lusin estis ankoraŭ revolucia demokrato, li jam skribis multajn elstarajn novelojn, eseojn kaj ideologiajn komentariojn, por senkompate kritiki la hommanĝajn malnovajn prietikajn instruojn kaj feŭdan kulturon. Post kiam li fariĝis granda komunisma batalanto kun la profunda disvolviĝo de la ĉina revolucio, kun proleta mondkoncepto kiel akra armilo kaj el la vidpunkto de klasbatalo kaj per metodo de klasa analizo, li plie

profunde sekcis la reakcian esencon de la diverskoloraj kultantoj de Konfucio kaj pledantoj por reveni al antikva sistemo en la ĉina moderna socio, kaj rigardis tiun batalon kiel gravan konsistigan parton de la batalo kontraŭ la “ĉirkaŭekstermo” entreprenata de Kuomintango kontraŭ komunismo kaj kontraŭ la agreso fare de la imperiismo. Sur la fronto de kritiko kontraŭ Kong-butiko, strikte ligante ĝin kun la aktuala politika batalo, Lusin profunde malkaŝis la reakcian klasan esencon de Konfucio kaj konfucianismo kaj la reakcian vizaĝon kaj krimajn celojn de la disĉiploj de Konfucio tiun kultantaj.

La bazo de la reakcia penso de Konfucio estis “antaŭdestinismo”. Li propagandis, ke la t.n. “ĉielo” destinas ĉion kaj la “ĉiela destino” estas neŝanĝebla. La esenco de lia celado estis nenio alia ol tio, ke la laboranta popolo “obeeme estu sklavo” kaj ne ribelu kontraŭ la ekspluatitaj klasoj. Lusin akre montris tion ke “Ĉinio havas siajn saĝulojn kaj klerulojn. ‘Kiuj laboras intelektu, tiuj regas; kiuj laboras fizike, tiuj estas regataj. La regatoj manĝigas aliajn, dum regantoj manĝas je aliaj.’ Kiel klare kaj rekte estas eksplicite dirite.” Tio ja estas la neniam ŝanĝota “ĉiela destino” celita de Konfucio!

La kerno de la penso de Konfucio estas “*ĵen*”. La enhavo de “*ĵen*” inkluzivas “amon kaj respekton al la gepatroj kaj pliaĝaj fratoj”, “fidelecon kaj indulgemon” k.t.p. Unuvorte, ĉio tia kiel la hipokritaj “humaneco, justo, moralo kaj virto” estas propagandataj de la ekspluatitaj klasoj. Lusin faris drastan atakon al tiu esenco de Konfucio. Ĉirkaŭ la dudekaj jaroj li skribis artikolojn kiel *Mia Koncepto pri la Vidvina Fideleco kaj Mortpreteco por la Mortinta Edzo*, *“Legado de Konfucianismaj Klasikaĵoj” en la jaro 14-a<sup>2</sup>*, *Pri la Disfalo de Pagodo Lejfeng<sup>3</sup>*, *Bildoj pri 24 Filoj Ideale Bonaj* kaj aliajn verkojn, kiuj kvazaŭ akraj glavoj rekte trapikis en la kernon de la penso de Konfucio. Lusin trafe malkaŝis



la hommanĝan esencon de la t.n. “humaneco, justo, moralo kaj virto”. En iu el liaj noveloj estas dirite: “Mi malfermis libron pri historio, sed en la libro nenie troviĝis kronologiaj datoj. Sur ĉiu paĝo estis la samaj oblikve starantaj vortoj: humaneco, justo, moralo kaj virto. Ĉar mi neniel povis endormiĝi, do mi atente legadis ĝis noktomezo kaj trovis finfine, ke inter strekoj de la ideografiaĵoj sur la tuta libro ĉie svarmas la vortoj ‘hommanĝo, hommanĝo!’”

“Humaneco” de Konfucio estas ankaŭ la t.n. “humana politiko” aŭ “bonkoreca reĝimo” vaste distrumpetata poste de la sekvantoj de Konfucio. Ĝi fakte estas kovrotuko, kiun la reakciaj regantoj de ĉiuj dinastioj uzis por kaŝi sian kruelan ekspluatton kaj subpremadon al la vasta laboranta popolo. Lusin multfoje malkaŝis ilian trompon. Li diris: “La bonkora reĝimo de Ĉinio kvankam ŝajnas io kontraŭa al la perforta, tamen ili estas fakte ĝemeloj, kaj antaŭ aŭ post ĝi nepre aperos la perforta reĝimo.” Tial, “en Ĉinio absolute neniam estis bonkora reĝimo”. Konfucio en sia tempo funkciis en Lu-regno kiel “polica komisaro”, kaj nelonge post sia enoficiĝo ekzekutigis Ŝaŭĝeng Maŭ kiu estis lia rivalo. Ĉu tio estis “humana politiko”? Ne, tio estis sanga klasbatalo.

Konfucio mem neniam praktikis “humanan politikon” aŭ bonkoran reĝimon, tamen liaj sekvantoj respektis lian instruon kiel “nacian medolon” de la ĉinoj kaj gloris ĝin kiel “veron” por “savi la ŝtaton kaj nacion”. Unu vorto de Lusin jam trarompis ilian maskon: “Diri, ke antaŭe estis

vera praktikanto de bonkora reĝimo, tio estas mensogo, diri, ke ankoraŭ nun ekzistas tiaulo, tio estas nova drogo.” Drogo venena nur por narkoti la popolon. Ĝuste same kiel Lusin komparis en sia artikolo *Babilado en Printempa Fino*, ĝi efikas kvazaŭ venena pikilo de krabro, kiu faras sian viktimon nek morta nek viva per la venena pikilo, por ke la popolanoj “por ĉiam volonte servu kiel instrumento por servado kaj milito”. La klopodo de konfucianoj por “konservado de la malnova kulturo celas ke la ĉina popolo por ĉiam servu al la mastroj kaj daŭre ĉiam suferu kaj suferu.” Kaj la trompaĵo de “savo de ŝtato kaj nacio”, “ja neniam donis ian efikon ekde la antikveco”. Kontraŭe, ĝi kondukis la ĉinan popolon al sklaveco sub fremduloj kaj reduktis Ĉinion al duonkolonio. Lusin senkompate montris la fakton ke “niaj antikvaj sanktuloj kaj saĝuloj prezentis al ni sentencojn pri konservado de ĉio antikva kaj malnova kaj samtempe ankaŭ aranĝis por la konkerantoj grandan festenon konsistantan el ĉinaj gejunuloj, jadoj kaj silkaĵoj.” Ne estas mirinde ke ne nur la reakciaj regantoj de ĉiuj dinastioj, sed ankaŭ fremdlandaj agresantoj kultis Konfucion. Por la konfucianoj kion povas signifi la reduktiĝo de Ĉinio al kolonio aŭ duonkolonio! Laŭ ili, “nenio estas pli granda kaj grava ol kulti Konfucion kaj adori lian instruon, se nur tio estas garantiita, ili povas submetiĝi al ĉiu ajn nova dinastio. Kaj tiu, siaflanke, nomas tion ‘konkero de la koro de la ĉina popolo.’” Tiu lasta estas frazo, kiun dediĉe prezentis la disĉiplo de Konfucio Hu Ŝi al la fremdlandaj mastroj. Per tio Lusin plej bone

kaj komplete malkaŝis la naciperfidulan vizaĝon de lakeaj kleruloj.

Ĉar la instruo de Konfucio tiel konformas al la gusto de reakciaj regantaj klasoj de diversaj dinastioj ke ili kaj fremdlandaj agresantoj, ĉiam alte elportas Konfucion, “beligante lin per diversaj blankaj ŝminkaĵoj kaj levante lin ĝis terura alteco”. En la jaro 1935, kiam la reakcia kliko de Ĉiang Kajŝek plenforte pledis por “kulti Konfucion kaj legi liajn klasikaĵojn” en la lando, kaj eksterlande fremdlandaj imperiistoj energie konstruigis templojn de Konfucio, Lusin skribis la fame konatan artikolon *Konfucio en Moderna Ĉinio*, en kiu li malkovris profunde el la stargrundo kaj vidpunkto de la proletaro la reakcian rolon luditan de Konfucio en la ĉina historio kaj klasan esencon de la kulto al Konfucio fare de la reakciuloj, dirante: “La leviĝo de Konfucio en Ĉinio ŝuldis al la glorigado fare de potenculoj. Li estis sanktulo de potenculoj aŭ potencaspirantoj, kun nenia rilato kun simplaj popolamasoj.” Konfucio vivis en la epoko, kiam la sklava socio dekadencis tagon post tago kaj la feŭda socio komencis leviĝi, sed li provis kontraŭstari la historian fluon, ĉie persvadi por restarigi la sklavan sistemon. Pro la reakcieco de sia penso li frapiĝis ĉie kontraŭ muro en sia tempo. Kvankam Mencio honoris lin kiel “modernan sanktulon”, “tamen fakte tia li ne estis”. “Dum lia vivo neniu rigardis lin kiel sanktulon.” Li “gustumis multajn malagrablajojn dum sia vivo”. La titolon de “sanktulo” estis donita al li poste de la reakciaj regantoj pro ties propraj bezonoj kaj intereso.

Fakte, la glorado al Konfucio farita de potenculoj tute ne signifas, ke ili vere adoris tiun “sanktulon” sed ke ili nur uzis lin kiel “brikon por frapi pordon”. Per tiu vorto Lusin figure montris la reakcian rolon de Kong-butiko en la historio. Por ne citi ekzemplojn el malproksima estinteco, en la ĉina moderna historio ĉu kiam Juan Ŝikaj sin titolis imperiestro, aŭ kiam Ĝang Hjun restraŭris King-dinastion, Puji surtroniĝis kiel imperiestro de la marioneta Manĝoŭguo, Ĉiang Kajŝek starigis faŝisman diktaturon, ili ĉiuj senescepte aranĝis oferan solenon por “kulti Konfucion” kaj iniciati “restarigon de antikva sistemo kaj legadon de konfucianismaj klasikaĵoj”. Tiuj, kiuj kvankam apenaŭ scipovis legi, tamen multe parolis pri la t.n. “dek tri klasikaĵoj”, ja ne vere volis reveni al la tempo de Konfucio, kiam ili kultis Konfucion, sed “havis sian alian celon, nome, ili provis uzi Konfucion kiel “brikon” por malfermi la “pordon al feliĉo” de restaŭro.

Se potenculoj de la malnova Ĉinio uzis Konfucion kiel “brikon por frapi pordon”, ne estis escepto ankaŭ por la potenculoj eksterlandaj. Kiam la imperiistoj agesis Ĉinion, ankaŭ ili portis Konfucion fronten, dirante, ke ilia agreso celas “restarigi la konfucianismon en Ĉinio” kaj transformi ĝin en “feliĉan landon de bonkora reĝimo”. Lusin en sia tempo verkis plurajn artikolojn por malkaŝi la esencon de kulto al Konfucio fare de imperiismaj agresantoj. Li diris: “Nun oni aŭdas, ke ne mankas fremduloj adorantaj la ĉinan malnovan kulturon, kiel povas esti vera adorado, sed ne utiligo!”

Kiel ajn alte la reakciuloj en-kaj eksterlandaj glorigis Konfucion, tamen “la epoko ŝanĝiĝis, tial ili ĉiuj fiaskis evidente”. La historio pruvis, ke la resumo de Lusin estas nerefutebla vero.

De miloj da jaroj la ĉina laboranta popolo multe suferis sub la ekspluato kaj subpremado de en-kaj eksterlandaj reakciaj regantaj klasoj kaj mem spertis la katenon de konfucianismo en la spirito. El la historiaj spertoj de klasbatalo ili travidis reakcian klasan esencon de Konfucio kaj lia instruo. De miloj da jaroj la reakciaj regantoj plenforte glorigis Konfucion, ĉiumaniere starigis lian aŭtoritatecon kaj eĉ konstruigis templojn por Konfucio en ĉiuj gubernioj, sed la laboranta popolo neniam kultis lin kiel “sanktulon” kaj “la ordinaj popolanoj ne iris al templo de Konfucio por fari riverencojn”, ĉar ili komprenis, ke la instruo de Konfucio servas al “potenculoj” kaj estas uzataj por superregi la popolon. “Efektive, Konfucio elpensis elstarajn metodojn por regi la landon, tamen tiuj metodoj estas elpensitaj por la bono de potenculoj, kiuj superregas la popolanojn, sed neniam por la bono de la popolo.” Sekve Lusin montris la fakton ke “ŝajne neniu tiel bone komprenas Konfucion kiel la ĉinaj malkleraj popolanoj”. La granda komunisto Lusin ja estis la plej bona reprezentanto de la ĉina popolo. Kun sia sentima kontraŭtarda revolucia temperamento proleta li batalis kontraŭ Kong-butiko kaj ĝiaj defendantoj kun sistemo neskuebla. Li direktis sian lanĉpinton al diversaj elementoj kultantaj Konfucion kaj restarigantaj antikvan sistemon. La batalo inter kulto al kaj opono kontraŭ Konfucio deĉiam estas politika batalo. Lusin ĉiam ligis la kritikon kontraŭ Konfucio kun aktuala klasbatalo, kaj elirante el aktuala klasbatalo, li senkomparte ruinigis la spiritan apogilon — Kong-butikon, al kiu la reakcia klaso sin apogis.



“La batalo ankoraŭ longe daŭros, kaj la malnovaj metodoj estos ripetade uzataj.” Tio estas grava klasbatala sperto resumita de Lusin en sia longa batalo. Se ekzistas nur klasoj, ne povas esti likvidita klasbatalo kaj neniam ŝanĝiĝos la naturo de la reakciuloj. Malgraŭ la kadavro de Konfucio estis enterigita jam antaŭ pli ol 2,400 jaroj, kaj kiel “briko por frapi pordon” li jam longe putriĝis kaj ankaŭ la de li protektata ekspluata sistemo estis ĵetita de la ĉina popolo en rubujon, tamen en- kaj ekster-landaj reakciuloj ankoraŭ firme alkroĉiĝas al tiu kadavro. Liu Ŝaŭki, Lin Biaŭ kaj similaj trompistoj estas fidelaj disĉiploj de Konfucio. Ili kolportis konfucianismon kaj glorigis ĝin kiel ion dian, dirante, ke ĝi “povas prezentiĝi kiel virto en moderna tempo” kaj estas ia “fonto de la ĉina kulturo”. Lastatempe, ankaŭ la kuomintangaj reakciuloj plenforte kultis Konfucion en Tajvan. Kaj ankaŭ la social-imperiismo nomas putran konfucianismon kiel “eminentan kulturen heredaĵon” kaj kriaĉas por defendi Konfucion. Ĉio ĉi tio montras kiel strikte interligitaj estas en- kaj ekster-landaj reakciuloj. Ili ankoraŭ provas uzi Konfucion kiel “brikon” por frapi la pordon al restaŭro. Tamen kiel resumis Lusin: “La pordo al feliĉo tamen malfermiĝis al neniu.” Ĉiuj reakciuloj nur estos dispremitaj de la historia rado antaŭ la pordo.

Sed de la kontraŭa flanko tiuj reakciuloj edukas nin kaj plie klare komprenigis al ni “kiel ilo Konfucio estas utiligata por atingi iun celon”, kaj “pro tio la deziro faligi lin fariĝas ankoraŭ pli arda”.

En la raporto al la Deko Kongreso de la Partio kamarado Ĝoŭ Enlaj diris: “Ni devas bone priatenti klasbatalon en la superstrukturo, inkluzive de ĉiuj kulturaj sferoj.” Ni devas firme memori la instruon de Prezidanto Maŭ “**energie teni klasbatalon en ideologia sfero**”, lerni la ĝisfundan revolucionan spiriton de Lusin, la giganto en la ĉina kultura revolucio, kaj uzi la akran armilon de dialektika materiismo kaj historia materiismo por komplete frakasi Kong-butikon kaj la malnovan penson de ĉiuj ekspluataj klasoj kaj senlace batali por efektiviĝi plenan diktaturon de la proletaro en la superstrukturo, inkluzive de ĉiuj kulturaj sferoj.

1 *Moknomo por konfucianismo uzata dum la tempo de la movado 4a-Maja (1919).*

2 *14-a jaro de la burĝa respubliko de Ĉinio (aŭ 1925).*

3 *Fama budhisma pagodo ĉe la Okcidenta Lago, Hangĝoŭ.*





*Inter Amikoj*

# Niaj amikoj troviĝas ĉie tra la mondo

JEN TE

**D**UM la 25 jaroj ekde la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la ĉina popolo kaj la popoloj de la landoj en la kvin kontinentoj reciproke vizitis unu la alian kaj starigis inter si ponton de amikeco. Plikreskis inter ili la kompreno kaj amikeco, kaj plifortiĝis ilia reciproka subtenado kaj batala unuiĝo. Niaj amikoj troviĝas ĉie tra la mondo.

I

Nelonge post la fondiĝo de la nova Ĉinio, nia lando starigis diplomaciajn rilatojn kun multaj landoj. En 1971, la 26-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj akceptis la

projektan rezolucion elmetitan de Albanio, Alĝerio kaj 21 aliaj landoj; per tio estis forpelitaj la reprezentantoj de la Ĉiang Kajŝek-klika el la Unuiĝintaj Nacioj kaj restarigis tie niajn laŭlegajn rajtojn longtempe uzurpitajn. La diplomaciaj rilatoj de la nova Ĉinio plie vastiĝis. Ĝis septembro de 1974 nia lando jam starigis diplomaciajn rilatojn kun 97 ŝtatoj kaj regionoj, kun 47 el kiuj ĝi ekhavis tian rilaton en la sepdekaj jaroj.

La socialisma Ĉinio kontinue fortigas la revolucion amikecon kaj batalan unuiĝon kun la aliaj frataj socialismaj landoj sur la bazo de marksismo-leninismo kaj la proleta internaciismo. En la komuna batalo kontraŭ imperiismo kaj moderna reviziismo, Ĉinio plifortigas la unuiĝon kaj reci-



*La Delegacio de la Ĉina-Vjetnama Amikeca Asocio ricevis varman bonvenigon sur iu konstruejo de la provinco Ninh Binh.*



*Post kiam Kiaŭ Guanhua, estro de la Delegacio de la Ĉina Popola Respubliko, finis sian paroladon en la plena kunveno de la 29-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj je la 2-a de oktobro, multaj amikoj de diversaj landoj varme manpremas kun li.*

prokan subtenon kun la veraj marksismaj-leninismaj partioj kaj organizoj de diversaj landoj de la mondo.

Ĉinio estas evoluanta lando. Same kiel la evoluantaj landoj de Azio, Afriko, Latinameriko kaj aliaj regionoj, Ĉinio apartenas al la tria mondo. En la nunaj bataloj kontraŭ koloniismo, nova koloniismo, imperiismo, rasismo, cionismo kaj hegemoniismo, Ĉinio kaj aliaj landoj de la tria mondo kaj iliaj popoloj estas kunbatalantoj sur la sama fronto, kiuj ĉiam subtenas kaj helpas unu alian kaj starigis inter si batalan amikecon. En serio da internaciaj bataloj, Ĉinio batalas ŝultron ĉe ŝultro kun la landoj de la tria mondo kontraŭ ekspluatado, priirabado, superregado kaj interveno fare de la superpotencoj al la tria mondo. En la jaro 1974 jam pli ol dek ŝtataj aŭ registaraj estroj de la tria mondo, precipe tiuj el afrikaj landoj, sinsekve vizitis Ĉinion. Ili vizitoj estas grandega subteno kaj kuraĝigo al la ĉina popolo.

Ĉinio pliapaŝe disvolvis politikan, ekonomian kaj kulturalan rilatojn kun la landoj de la dua mondo, sur la bazo de la kvin principoj de paca kunekzisto. En septembro de la kuranta jaro, je la dua datreveno de starigo de diplomaciaj rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio, la ĉina-japana aerlinio estis oficiale malfermita al funkcio. La ekspozicio de la Ĉina Popola Respubliko, okazinta en julio kaj aŭgusto ĉijare, en Osaka, akceptis 2,600,000 vizitantojn. Tio montras ke neniu forto povas malhelpi la amikecon inter la popoloj de Japanio kaj Ĉinio.

Post malfermo de la pordo al la interrilatoj de Ĉinio kaj Usono, la kontaktiĝo de la popoloj de ambaŭ landoj ĉiam pli oftigas. Antaŭ nelonge fondiĝis en Usono tutlanda organizo — la Usona-Ĉina Popola Amikeca Asocio.

## II

Nova Ĉinio havas vastan interpopolan kontaktiĝon kun multaj landoj kaj regionoj. Pli ol 150 landoj kaj regionoj en la mondo havas komercajn rilatojn kun Ĉinio. En ĉiu jaro miloj da diversspecaj delegacioj kaj diversrondaj personoj el fremdaj landoj vizitas Ĉinion. Dume ankaŭ Ĉinio sendas al aliaj landoj centojn da delegacioj sportaj, kulturaj, higienaj kaj amikecaj. Ĉiuj tiuj intervizitoj akcelas la interkompreniĝon kaj amikecon inter la ĉina popolo kaj la popoloj de diversaj landoj en la mondo.

Amikoj kiuj unuafoje vizitas Ĉinion, sentas ĉion freŝe nova kaj ĵetas komparajn kaj esploremajn rigardojn al ĉio por bone observi kaj informiĝi. Amikoj, kiuj antaŭe jam vizitis Ĉinion kaj denove venas la Ĉinio post kelkaj jaroj, pliiĝas al si novajn komprenojn pri ĝi. Precipe la amikoj el la tria mondo ĉiam kun emocio vizitas Ŝaŭŝan, Jan-an, Ginggaŝ-monton kaj ankaŭ Daking, Daĝaj, Linhian, Ŝaŝiju... Kiel intimaj estas por ili la revoluciaj bataloj de la ĉina popolo kaj iliaj spertoj en klopodado por konstrui socialismon en malfavoraj kondiĉoj, sinapogante sur la propraj fortoj! La

gastoj kaj gastigantoj kune interparolas kaj kuraĝigas unuj la aliajn. Fremdlandaj amikoj estas profunde impresitaj post vizito al la ŝirmtunela sistemo de Pekino, kiu figure montras ke la ĉina popolo kun firma volo kaj decido pretas rebati agresantojn kaj defendi sian patrolandon en ĉiu ajn momento. Pere de vastaj interparoloj kun la ĉinaj kamaradoj, ili ekhavas plian komprenon pri la starpunkto prenata de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo, koloniismo kaj hegemoniismo kaj la strategia principo **“profunde fari fosajon, vaste akumuli rezervgrenon kaj neniam ĉasi hegemonion”**. Fremdlandaj amikoj tre atentis pri gravaj eventoj en la politika vivo de la ĉina popolo. Dank’ al kunsidoj kaj vizitoj ili havas pliprofundan komprenon pri ĝiaj Granda Proleta Kultura Revolucio kaj movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio.

Pere de ĉiam pli multaj kontaktiĝoj interpopolaj floroj de amikeco fariĝas pli belaj kaj la batalamikeco pli profunda. Ni akceptis nemalmultajn batalamikojn kaj fratojn el sudorienta Azio, arabaj landoj kaj Afriko, batalantajn kontraŭ imperiismo, koloniismo, hegemoniismo, cionismo

kaj rasismo. Iliaj justaj bataloj estas forta subteno al la ĉina popolo. En Ĉinio ili faris vastajn kontaktiĝojn kun ĉinaj laboristoj, kamparanoj, ĈPL-anoj kaj milicianoj. Multaj el ili emocie nomis ĉinajn fratojn iliaj “veraj amikoj”. Ili rigardis la venkojn de la ĉina popolo gajnitajn sub direktaĵo de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ Zedong kiel siajn proprajn kaj kiel forton, kiu kuraĝigas ilin al persistado en la batalo. Iuj skribis sur sia donaco al ĉina amiko: “Oceanoj kaj maroj povas nin apartigi, sed nia amikeco kunligas nin fendante iliajn ondegojn.” Tio vivece spegulas la profundan amikecon inter nia popolo kaj la popoloj de diversaj landoj en la mondo.

### III

Oni ankoraŭ memoras, ke tuj post la fondiĝo de la nova Ĉinio troviĝis iuj imperiismaj fortoj malamikaj al la ĉina popolo, kiuj ĉiumaniere klopodis izoli Ĉinion de la cetera mondo. Depost la jaro 1960 la social-imperiismo energie klopodas levi kontraŭĉinan kampanjon plenforte kalumnias kaj

*La Ekspozicio de la Ĉina Popola Respubliko en Tokio ricevas varman akcepton de la japana popolo.*




ĵetas koton kontraŭ ĝi, sed ĉio tio ne povas malhelpi al Ĉinio disvolvi siajn eksterajn rilatojn. Ĉar la interamikiĝo de la diverslandaj popoloj kun la ĉina popolo estas monda tendenco kaj konformas al homara deziro kaj ĝi estas historia fluo, kiun povas retenigi ja neniu ajn.

Nun, plejparto de la sub-organizoj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj ĉiam pli multaj internaciaj organizoj sinsekve forpelis el si la reprezentantojn de Ĉiang Kajŝek-kliko kaj redonis la laŭleĝan lokon al Ĉinio. En novembro de 1973, la Sporta Federacio de Azio forpelis el si la Ĉiang Kajŝek-klikon kaj rekonis la Ĉinan Tutlandan Sportan Federacion kiel sian plenrajtan membron. La ĉinaj sportistoj unufoje partoprenis la Sepan Azian Sportkunvenon okazintan en Irano. Sub la apogo de multaj amikaj landoj, naŭ aziaj sportaj organizoj de speciala branĉo unu post alia sekvis la ekzemplon. Ĉiuj justamaj personoj en la mondo rekonas ke ekzistas nur unu Ĉinio, kaj ke Tajvan estas neapartigebla teritorio de la Ĉina Popola Respubliko. La intrigo de "du Ĉinioj" aŭ "unu Ĉinio, unu Tajvan" kovita de plenmano da kontraŭĉinaj elementoj jam komplete fiaskis sub la forta kondamno kaj opono de la ĉina popolo kaj la revoluciaj popoloj de la mondo.

La subteno de diverslandaj popoloj al la ĉina popolo estas multflanka kaj tre kuraĝiga. Por plifortigi la amikecon kun la ĉina popolo, multaj

landoj fondis amikecan organizon por Ĉinio. En iuj landoj troviĝas kelkaj, dekelkelkaj kaj eĉ kelkdek tiaj amikecaj organizoj. La membroj de tiuj amikecaj organizoj kaj amikaj individuoj vizitintaj Ĉinion aktive laboras en sia lando por disvolvi la interpopolan kompreniĝon kaj amikecon kun Ĉinio. En la formoj de eldono de periodaĵoj, aranĝo de ekspozicioj, projekcio de filmoj, verko de artikoloj, faro de paroladoj kaj aliaj, ili prezentis la atingojn de la socialisma revolucio kaj socialisma

*La Vuhan-a Akrobata Trupo de Ĉinio en Argentino*



*En Georgetown, la ĉefurbo de Gujano, estas pendigita superstrate granda rubando kun la vortoj: "La gujana popolo bonvenigas la Ĉinan Tablotenisan Delegacion."*


konstruado de Ĉinio por semi amikecon. Aparte kortuŝa estas tio ke multaj grandaĝaj malnovaj amikoj ankoraŭ plenenergie laboras senripoze por pliigi la amikecon de sia popolo kun la ĉina.

La disvolviĝo de la amikaj interrilatoj de nia popolo kun la diverslandaj popoloj de la mondo plene pruvis la pravecon de saĝaj vortoj de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong: **“La marksisma-leninisma vero estas ĉe nia flanko. La internacia proletaro estas ĉe nia flanko. La subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj estas ĉe nia flanko. Pli ol naŭdek procentoj de la popolamasoj de la tuta mondo estas ĉe nia flanko. Niaj amikoj troviĝas ĉie tra la mondo.”**

La ĉina popolo havas profundan dankon al la popoloj de diversaj landoj de la mondo pro iliaj simpatio kaj subteno donitaj antaŭ kaj post la venko de la ĉina revolucio. La ĉina popolo certe ne vanigos ilian amikecon kaj esperon, kiujn ili havas por ĝi. La Granda Proleta Kultura Revolucio de Ĉinio kaj la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio disvolviĝanta nun tra la tuta lando, ambaŭ celas preventi restaŭron de kapitalismo kaj garantii ke la socialisma Ĉinio neniam ŝanĝos sian koloron kaj ĉiam staros ĉe la flanko de subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj.



*La Ĉina Luktarta Delegacio en San-Francisko*



## MULTAJ KULTURAJ OBJEKTOJ NOVE ELTERIGITAJ

Post la trovo de multaj valoraj historiaj kulturaj objektoj en la tombo n-ro 1 el la Han-dinastio en Mavangduj, Ĉangŝa, niaj arkeologiaj laborantoj faris tie novan fosadon ĉijare en la tomboj n-roj 2 kaj 3, kaj akiris ankoraŭ pli riĉan valoran elfosaĵon.

Sur la silkaj teksaĵoj trovitaj en la tombo n-ro 3 estas mane skribitaj en skribformoj *hiaŭĝuan* kaj *liŝu* per inko antikvaj verkoj plejparte malaperintaj jam unu

aŭ du mil jarojn kun totale pli ol 120,000 ĉinaj ideografiaĵoj. Inter ili estas du kopiaĵoj de *Laŭzi*, kies vicordo de ĉapitroj estas malsama al la nuna, kaj varias ankaŭ iliaj tekstoj, kaj unu kopiaĵo de *Gan Guo Ce* (Historiaj Notoj pri Militantaj Regnoj — 476 a.k. - 221 a.k.) kun pli ol 12,000 ideografiaĵoj, el kiuj pli ol duono ne troviĝas en la nuna eldono. Estas ankaŭ mapoj kaj planoj de garnizonoj, kiuj estas la plej fruaj mapoj trovitaj de Ĉinio. Kaj krome, estas pli ol 600 bambuaj slipoj, el kiuj 200 temas pri medicino.

Trovo de tiuj verkoj liveris novajn kaj riĉajn materialojn por studi la historion kaj filozofion de antikva Ĉinio kaj la batalon inter konfucianismo kaj legalizismo en la komenca periodo de Okcidenta Han-dinastio (206 a.k. - 8 p.K.).

# “Ĉiam antaŭen!”

— Pri la Sepa Azia Sportkunveno

**S**UPER la sporta centro Arymehr de Teherano flirtas en vento sennombraj diverskoloraj flagoj kaj brulas grandega torĉo sur alta teraso en la ĉefa stadiono. Antaŭen marŝu sportistoj de aziaj landoj, antaŭen, “ĉiam antaŭen”!

Ĉifoja Azia Sportkunveno estas senprecedence granda en la sporta historio de Azio. En la jaro 1951, kiam ĝi okazis unuafoje, nur pli ol 400 sportistoj el 11 landoj kaj regionoj partoprenis en la konkursoj de ses sportbranĉoj. Sed nun ĉ. 3,000 sportistoj el pli ol 20 aziaj landoj kaj regionoj partoprenis respektive en la konkursoj de 16 sportbranĉoj, en kiuj unuafoje partoprenis la sportistoj de Ĉinio, Koreio, Kuvajto, Irako, Laoso, Barejno kaj Mongolio. La okazigo de la sportaj ludoj akcelis la amikecon kaj solidarecon inter la sportistoj kaj popoloj de Azio.

## UNUIĜO ESTAS FORTO

Azio kun la plej granda areo, la plej multa loĝantaro kaj tre longa historio el la kontinentoj de la

*Iranaj, pakistanaj kaj ĉinaj halterlevistoj estas tiel intimaj kiel fratoj.*



mondo, multe suferis la agreson kaj subpremadon de imperiismo kaj koloniismo en pasintaj kelkaj jarcentoj. La aziaj popoloj havis saman suferon en la pasinteco kaj vizaĝas hodiaŭ al la komuna tasko unuiĝi por batali kontraŭ hegemoniismo, kio komprenigis al ili, ke nur solidareco povas garanti al ili sendependiĝon de ŝtato, nacian liberiĝon kaj disvolviĝon de ekonomio, kulturo kaj sporto. En la kunveno ofte aŭdiĝis la vortoj ŝatataj de diverslandaj amikoj: “La aferoj de la aziaj popoloj devas esti decidataj de la aziaj popoloj mem.” Jen estas ilia komuna voĉo.

Ke la ĉina sporta delegacio partoprenis tiun ĉi kunvenon, tio estas venko akirita de la diverslandaj popoloj de Azio en la komuna batalado. Antaŭ unu jaro, pro obstrukco de malmultaj reakciaj fortoj en internaciaj sportaj organizoj, iuj opiniis, ke la partopreno de Ĉinio en la Sepa Azia Sportkunveno estas malfacile solvebla problemo. Por elpeli Ĉiang Kajŝek-klikon el kaj restarigi la leĝan rajton de la Ĉina Popola Respubliko en ĝi, multaj amikaj

*Ĉinaj, koreaj kaj japanaj gimnastikaj trejnistinoj kaj sportistinoj kore interparolas.*



landoj kaj individuoj de sportaj rondoj de Azio faris firman bataladon. Irano, kiel gastiganta lando de tiu ĉi kunveno, faris gravan kontribuon en tio. En novembro de la lasta jaro, okazis en Teherano kunveno de la konsilantaro de la Azia Federacio de Sportoj, kiu per adopto de rezolucio per superega plimulto elpelis Ĉiang Kajŝek-kilkon kaj rekonis la Ĉinan Tutlandan Sportan Federacion kiel membron, sub la apogo de Irano kaj aliaj aziaj landoj. Kiam la Ĉina Sporta Delegacio atingis Teheranon, iranaj kaj alilandaj amikoj ĝoje diris: "La alveno de la ĉina delegacio signifas, ke la amikeco kaj unuiĝo de la aziaj popoloj estas de neniu barebla. Nenion bonan atingos ĉiu ajn, kiu provas krei malintegrecon inter la aziaj popoloj."

La volo de sportistoj el aziaj landoj kaj regionoj unuiĝi kaj amikiĝi kun la ĉinaj, kvazaŭ forta orienta vento, blovis ĉien en kaj ekster la stadiono. Informiĝinte en Teherano ke malmultaj homoj en la Internacia Federacio de Naĝo malpermesis naĝkonkurson de aziaj sportistoj kun la ĉinaj, multaj aziaj amikoj esprimis sian indignon kaj riproĉis sinsekve la arbitran agon de la Plenuma Buroo de la Internacia Naĝfederacio por interveni en aziajn aferojn. Atinginte Iranon la ĉinaj naĝa, plonĝa kaj akvopilka teamoj tuj ricevis varman akcepton. Ili ludis ekzerce akvopilkon kun iranaj kaj kuvajtaj sportistoj, kune ekzercis sin pri naĝo kun diverslandaj naĝistoj de Sudorienta Azio, kaj pri plonĝo kun japanaj plonĝistoj. Pro la subteno de diverslandaj amikoj kaj la solidareco de aziaj sportistaj rondoj al Ĉinio, la Internacia Naĝfederacio devigite

*Ĉinaj kaj kuvajtaj tablotenisistoj gratulas unu la alian.*



ŝanĝis fine sian eraran decidon. La nova informo ekboligis la sportistan loĝkvartalon kaj diverslandaj sportistoj tuj esprimis sian gratulon unu post alia al la ĉinaj.

## AMIKECO PLI VALORAS OL ORAJ MEDALOJ

La komunaj interesoj kaj komuna batalo kompakte ligis aziajn popolojn kaj sportistojn. Multaj el la sportistoj komprenis, ke ilia celo en la konkursoj estas ne ĉampioneco sed amikeco kaj akcelado de disvolviĝo de sportaj aferoj. La sportistoj de diversaj landoj estas unuflanke rivaloj en konkursado kaj aliflanke intimaj amikoj.

La du popoloj de Ĉinio kaj Koreio estas intimaj kunbatalantoj kaj fratoj. Dum la konkursoj oni ofte povis vidi kortuŝajn scenojn de amikeco kaj unuiĝo inter la ambaŭlandaj sportistoj. En iliaj renkontiĝoj ofte aŭdiĝis ĉinaj kantoj kantataj de koreaj sportistoj en la ĉina lingvo, kaj koreaj kantoj kantataj de ĉinaj sportistoj en la korea. Ili helpis unu la alian por kune progresi. Foje, krea skermtrejnistino rimarkis, ke la supra korpo de la ĉinaj skermistinoj Jan Juejing kaj Su Juĝen ne estas stabila dum ekzercado, kaj tuj kun zorgemo montris al ili la mankon. La sportistoj de ambaŭ landoj sentis el persona sperto, ke la de sango koagulita amikeco inter la du popoloj profundas kiel maro.

Ĉinaj atletistoj kaj tiuj de Pakistano kaj Srilanko jam estas malnovaj amikoj. Ĉe interrenkontiĝoj ĉiam venis al ili rememoroj pri reciprokaj sub-

*Ĉinaj kaj iranaj naĝistinoj interŝanĝas spertojn dum ekzercado.*





*Ĉinaj pafistinoj Leng Gujijing kaj Li Jamin kore interparolas kun iranaj amikoj.*

tenado kaj helpado inter la respektivaj popoloj, kaj ili ĉiam eksentis intiman amikecon inter si. De la lastaj jaroj la nivelo de volanludo de Pakistano rapide leviĝis. Post venko super korea kaj japana teamoj, la pakistana vira volana teamo renkontiĝos kun la ĉina. Antaŭ duopa konkurso pakistana volanisto Wadood ekzercis sin kun la ĉina sportisto Hoŭ Giaĉang kaj modeste lernis de la lasta la teknikon de serviro (enludigo de la pilko) per malalta pilko. Perdinte en la duopa konkurso Wadood ankoraŭ ekzercis sin kun la ĉina volanisto Ĉen Tianhiang por altigi sian lertecon kaj kune progresi.

Iutage, en hele iluminita gimnastika halo intense iris teama konkurso de gimnastiko inter Ĉinio, Koreio kaj Japanio. Subite japana eminenta gimnasto Igaraŝi Takeo falis de sur la reko kaj vundiĝis. Ĉina gimnasto Jang Mingming, kiu sin okupis siatempe pri konkurso, estas lia bona amiko. Kurantjare kiam la ĉina gimnastika teamo vizitis Japanion, Igaraŝi faris en Osaka por malgranda Jang surskribon "Amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj daŭru de generacio al generacio" per ĉinaj ideografiaĵoj. Je la adiaŭo en Tokio li kun larmoj en la okuloj forte manpremis kun malgranda Jang dirante: "Ĝis revido en Teherano!" Hodiaŭ efektiviĝis la renkontiĝo, tamen bedaŭrinde li vundiĝis. Tial en la sekvinta tago, Jang Mingming, Caj Huangong k.a. ĉinaj gimnastoj vizitis lin. Neniu forto povas apartigi la amikecon starigitan inter la sportistoj de Ĉinio kaj Japanio.

Ankaŭ la amikeco inter sportistoj de Ĉinio kaj Malajzio, Singaporo, Tajlando kaj Filipinoj plua-

paŝe fortiĝis. La vira volana teamo de Malajzio havis nur tri volanistojn, tial dum ekzercado duopa mankis al ĝi unu ludanto. Tiam ĉina volanisto meminciante sin ekzercis kun ili. La malajzia teamestro diris emocie: "La amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Malajzio kvazaŭ fluanta akvo neinterrompebla per tranĉilo." Tajlanda pafistino multfoje komunikis al la ĉinaj sportistoj la deziron de tajlandaj pafistoj kiuj ne venis al Teherano: "Ni esperas ke ni havos ŝancon viziti Ĉinion." Tiam la ĉinaj pafistinoj esprimis al ŝi sian varman bonvenon al ili.

Ĉiu spektanto infektiĝis de amikeca atmosfero sur konkursejoj. En la kvina de septembro, iris intensa sed amikeca matĉo de akvopilko inter Ĉinio kaj Irano. Kvankam la matĉo havis decidan signifon por la ĉampioneco, tamen por la dulandaj sportistoj la ĉefa celo estis ne ĉampioneco, sed amikeco. Kiam finiĝis la matĉo per rezulto 5:5, la dulandaj sportistoj alnaĝis unuj al la aliaj kaj varme brakumis reciproke en klara akvo. Poste la ambaŭ flankoj konkursis respektive kun la kuvajta teamo, fine Irano gajnis la ĉampionecon, Ĉinio la duan lokon kaj Japanio la trian. Dum la donado de premio, iranaj spektantoj levis siajn sportistojn kaj portis ilin ĉirkaŭ la konkursejo kaj huraadis kun manklakado al ĉinaj kaj japanaj sportistoj. La gajaj homamasoj eĉ levis prezidanton de la Irana Naĝsporta Asocio kaj ĵetis lin en la naĝbasenon por trempi lin en amikeca akvo. En tiuj bolantaj scenoj la ĉinaj sportistoj kortuŝe diris: "Amikeco pli valoras ol oraj medaloj. Nia vera celo en la konkurso estas fortigi la solidarecon inter la aziaj popoloj."

Abunde fruktiĝis la buntaj floroj de amikeco en la azia sportista loĝkvartalo. Sub lukse brilantaj lampoj ĝojego bolis en la loko, kie iuj sin amuzis, aliaj intime interparolis kaj triaj resumis la sperton. Dekoj da amuzkunvenoj estis okazigitaj de ĉinaj sportistoj kun la diverslandaj kolegoj. Ili elkore kantadis en sama halo, kaj ĉie regis ĝojiga atmosfero de unuiĝo kaj amikeco.

## NOVA PAĜO KUNE SKRIBITA

En tiu ĉi kunveno oni ĝoje vidis, ke plidisvolviĝis la sportaj aferoj kaj plialtiĝis la sporta nivelo de la aziaj landoj kaj regionoj. Iuj landoj, kiuj antaŭe suferis kruelan subpremadon de imperiistoj kaj koloniistoj kaj kies sportaj aferoj disvolviĝis relative malrapide, nun jam atingis ĝojindan progreson. La lertaj ludoj de pakistanaj volanistoj




rikoltis aplaŭdojn en la konkursoj. Kuvajtaj sportistoj de gimnastiko, plongo kaj tabloteniso profunde impresis spektantojn per siaj vogleco kaj diligenteco en lernado. Ankaŭ la iranaj sportistoj montris siajn bonegajn atingojn en siaj tradiciaj sportdisciplinoj de lukto, halterlevo kaj manpilkado, kaj en atletiko, biciklado kaj akvopilkado.

Dum la konkursado, estis rompita unu monda rekordo kaj pli ol 50 rekordoj de Azio renovigitaj, kio markas rapidan altiĝon de la sporta nivelo en Azio. En atletikaj konkursoj kortuŝaj bildoj de kuna progreso montriĝis en tio, ke plimultiĝis la landoj, kiuj gajnis la unuan, la duan aŭ la trian lokon. La niveloj de tabloteniso, volano, plongo, akvopilkado, altasalto, pafado kaj gimnastiko jam atingis aŭ alproksimiĝis al la monda nivelo. Ĉinaj kaj japanaj plongistoj jam enviciĝis en avangardulojn de la mondo per sia mastrado de altgrade malfacileco teknika. Gimnastinoj ĉinaj, koreaj kaj japanaj komencis provi sur trabo la altgrade malfacilajn movojn, kiujn ili plenumis en grundgimnastiko kaj adaptis sur ŝtupa paralelo iujn movojn plenumatajn de viroj sur reko, tiel ke ili faris novan paŝon al malfacileco. Ankaŭ la volana kaj naĝa niveloj de sudorientaj landoj altiĝis kompare rapide.

La okulfrapa trajto de tiu ĉi kunveno estis emerĝo de junaj sportistoj. La plejparto el naĝistoj

estas junuloj kaj infanoj. Japana naĝistino Harouka Toŝiko, kiu gajnis ĉampionecon de 100-metra kaj 200-metra virinaj brustnaĝoj, estas nur 15-jara. Japana naĝistino Hacuda Jasue, kiu gajnis ĉampionecon de 100-metra virina papilinaĝo, estas nur 14-jara. Inter plongistoj troviĝis 11-jara Kejhaneh de Irano kaj 14-jara Kakumaru Fusako de Japanio. La ĉinaj plongistoj Li Kongĝeng kaj Liu Ŝuj estas respektive 15-jara kaj 16-jara, kiuj ĵus debutis kaj jam enviciĝis en la mondan avangardaron de plongistoj. Inter gimnastoj troviĝis 13-jara Kim Choon Sen de Koreio, 11-jara Azimzadeh de Irano kaj 14-jara Hin Gujkiu de Ĉinio, kiuj montris la promesplenon estontecon en siaj plenumadoj.

La Sepa Azia Sportkunveno pliiĝis la amikecon kaj unuiĝon inter la aziaj popoloj kaj sportistoj, akcelis disvolvigojn de la sportaj aferoj en Azio kaj skribis novan paĝon en la azia sporta historio. La registaro kaj popolo de Irano kiel gastiganto faris grandegan kontribuon por ĝia venka okazigo kaj gajnis respekton kaj aplaŭdon de diversaj landoj de Azio. Jam venke fermiĝis la kunveno, tamen la slogano de ĝia ĉefa celo "Ĉiam antaŭen" daŭre kuraĝigos aziajn sportistojn brave antaŭenmarŝi sur la vojo de unuiĝo kaj amikeco en la bonega situacio de unuiĝo por batali kontraŭ hegemonismo!



*En la ferma ceremonio de la Sepa Azia Sportkunveno la ĉinaj sportistoj adiaŭas la rigardantojn svingante florbukedojn.*

# Hindio senbride aneksis Sikimon

**E**N la komenco de septembro, ĉijare, la hinda registaro senbride aneksis la princlandon Sikimon, tute spite la firman oponon de la sikima popolo kaj fortan kondamnon de la monda publika opinio. Tio estas alia agresado de ekspansismo de la hinda registaro de Indira Gandhi post ĝia dismembrigo de Pakistano kun la subteno de Sovetunio.

Post efektivigo de sia sendependiĝo Hindio heredis la mantelon de imperiismo kaj ĉiam praktikas koloniisman politikon kontraŭ Sikimo. Kun la proteksto ke okazas tumulto en Sikimo, ĝi sendis siajn trupojn en Gangtokon, la ĉefurbon de Sikimo, en la 4-a de aprilo, 1973, kaj perforte transprenis la tutan regpotencon de la sikima registaro. Post sia unua nuklea provo en majo de la kuranta jaro, Hindio probable sentis sian talion forta kaj povis fari ĉion, kion ĝi volas kontraŭ siaj najbaroj. Tiel en junio ĝi altrudis al la popolo de Sikimo la tiel nomatan "bilon de la registaro de Sikimo" fabrikitan tute de si mem. La koloniisma regado de Hindio super Sikimo vekis fortan kontraŭstaron de la sikima popolo. Ili plurfoje okazigis demonstraciojn, postulante aboli la hindan-sikiman traktaton kaj forpeli la hindajn trupojn el Sikimo. La reĝo de Sikimo sinsekve skribis al la ĉefministro de Hindio protestante kontraŭ la enprenado de Sikimo fare de la hinda registaro en Hindion kaj postulante protekton de la "aparta identeco kaj internacia personeco" de Sikimo. Sed la hinda registaro kiel potenculo ofendis malfortulon kaj kiel giganto aneksis etulon, kaj eĉ publike faris Sikimon "asociata ŝtato" de Hindio, tiamaniere ĝi aneksis Sikimon per koloniisma rimedo. Svaran Singh, ministro de eksteraj aferoj de Hindio, eĉ senhonte deklaris ke la aneksado de Sikimo fare de Hindio estas ago "sankte neatencebla" kaj "ŝanĝebla de neniuj sola flanko". Tio estas rabista logiko de la kapo ĝis la piedo kaj plene malkovris la abomenindan vizaĝon de ekspansismo de la hinda registaro.

Sikimo ne estas ŝtatbieno de Hindio kaj la sikima popolo ankaŭ ne estas la naturalizita de Hindio. Kiajn argumentojn kaj rajtojn Hindio havas por aneksi ĝin? Kvankam la montoza lando ĉe Hima-

lajo estas malgranda kun malmulta loĝantaro, tamen same kiel ĉiu ajn lando en la mondo ĝi rajtas esti sendependa kaj memdecidema, kaj rajtas mastri sian sorton. Ĉio kion la hinda registaro faris al Sikimo estas nenio alia ol senigi la sikiman popolon je la rajto "sankte neatencebla". La hinda registaro tiel tirane kriaĉis, ke tio estas "ŝanĝebla de neniuj sola flanko". Ĉu la hinda registaro nur perforte atribuis al Sikimo la de ĝi propramane fabrikitan "bilon", do la lasta nepre devas obeeme akcepti ĝin kaj por ĉiam fariĝi naturalizito de Nov-Delhio? Kia teorio estas tio!


Ekde la Dua Mondmilito, dekoj da koloniaj kaj duonkoloniaj landoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko jam rompis la katenon de imperiismo kaj koloniismo kaj gajnis sendependecon post sia batalado. Eĉ la malnovaj koloniistoj kiel Portugalio ne povis teni sian koloniisman regadon en Afriko kaj vole-nevole konfesis la sendependiĝon de Gvineo (Bissau) kaj Mozambiko, sub la forta atako de la armita batalo de la popoloj de siaj kolonioj. Sed ĝuste en tiu tempo la hinda registaro heredis la malnovan artifikon de koloniistoj kaj senbride aneksis Sikimon. Tio ne nur malkovris la falsan maskon de la hinda registaro antaŭ la popoloj de la tria mondo kaj de aliaj landoj de la tuta mondo ke ĝi "subtenas naciliberigan movadon" kaj "oponas kontraŭ imperiismo kaj koloniismo", kaj malkaŝis ĝian grandan ambicion fariĝi duaranga superpotenco.

Kial la hinda registaro kuraĝas publike aneksi Sikimon? La kaŭzo, kiel ĉiuj scias, kuŝas en tio ke post la dorso de la hinda registaro staras superpotenco — social-imperiismo de la sovetunia reviziismo, kiu subtenas kaj instigas ĝin. Sen ĝia subteno kaj helpo, Hindio kuraĝus nek dismembrigi Pakistanon, nek aneksi sendependan princlandon Sikimon ĉe Himalajo.

La hinda registaro kruele subpremas nacimalplimultojn enlande kaj praktikas ekspansian politikon ekstere kaj faris novan krimon per aneksado de Sikimo. Ĉiuj krimaj faroj de la hinda registaro certe vekos pli fortan kontraŭstaron de la sikima popolo kaj la popoloj de aliaj landoj de la tuta mondo inkluzive de la popolo de Hindio.

# Elektronika Kom- putero de Integra Cirkvito Komune Farita de Fabriko Kaj Universitato

Metalo-oksido-transistora portabla elektronika komputero de integra cirkvito, kune projektita kaj fabrikita de Kinghua-universitato kaj la Tria Radioaparata Fabriko, estas frukto de kombiniĝo de instruo, scienca studo kaj produkto en kunlaborado de la fabriko kaj la universitato.



Laboristino de transistora laborejo de Kinghua-universitato ekzamenas kvaliton de integra cirkvito per memfabrikita instalaĵo kun 28 esploraj pikiloj.

Laboristoj de la Tria Radioaparata Fabriko de Pekino kontrolas la elektronikan komputeron prove fabrikitan de la fabriko kaj la universitato.






Rikoltado de tritiko



En regiono Baŝang de Hebej-provinco ĉ. 667 hektaroj da bonspeca tritiko kurantjare donis la plej bonan rikolton en la historio. Pohektara produktokvanto de nemalmultaj terpecoj superis 6,000 kg., kaj tiu de iuj inter ili eĉ atingis 7,500 kg.

Tiu loko altas 1,400 metrojn super la mara nivelo kun malvarma klimato kaj ĝia senprujna tempo daŭras nur 99 tagojn. Sub tia natura kondiĉo Baŝang-anoj multe entreprenis pri akvoutiligo, faris forstumadon, bedkampojn, disvastigon de bona speco de tritiko kaj aplikis sciencan kulturen metodon, tiel ke ili rikoltis altan produkton de tritiko.

Fotitaj de Ĝang Ĝimling



Kombajno de marko Dongfeng fabrikita de Ĉinio



Ĝojo pro riĉa rikolto

Rikoltita greno



# Nova Fizionomio sur Paŝtejo de Pamiro-altebenajo de Hingiang

Bulunkou-a popolkomunumo de Kezilesu-a Ĥalhaza Aŭtonoma Subregiono de Hingiang sin trovas ĉe la piedo de Gongge-monto de

Pamiro-altebenajo. Tieaj loĝantoj energie disvolvas brutobredon, tiel ke prosperiĝis la paŝtejo.

Ĉiutagaj bezonaĵoj estas senditaj al paŝtejo.






Ŝafaro ĉe Gongge-monto de Pamiro-altebenajo



Paŝtistinoj tondas lanon de kaproj, kiu estas krudmaterialo de delikataj teksaĵoj.



Plastaj membranoj produktitaj de fabriko de plastajoj jam estas vaste uzataj en kamparo de Ninghia.



Cementaj tuboj produktitaj de la konstrumateria fabriko por pute fosado en kamparo.

## Loka Industrio de Gubernio Vuĝong de Ninghia en Disvolviĝo

La gubernio Vuĝong dense loĝata de hujnacionoj jam fariĝis nova industria urbeto. Nun ĝi havas 60 industriajn entreprenojn de maŝino, kemio, aparato, prilaborado de lano kaj kotono kaj aliaj, el kiuj duono servas al agrikulturo.

Antaŭ la Liberiĝo, la gubernio havis nur unu lanŝpinteksejon kaj kelkajn metiejojn. Post la Liberiĝo, precipe de post la granda kultura revolucio, ĝia totala industria produktovaloro 190-oble pliiĝis ol tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo.



Kemisterka fabriko de la gubernio provizas najbarajn guberniojn per ĝia kemisterko.





# La termofontoj de Ĉinio

## Ĉina Geografio

ĈINIO estas unu el la landoj abundaj je termofontoj en la mondo. Ĝis nun oni trovis en la tuta lando pli ol 2,000 termofontojn, inter kiuj nemalmultaj estas fontoj kun temperaturo de pli ol 60°C aŭ 100°C krom multaj kun malalta kaj mezalta temperaturo.

### DISLOKIGO


La termofontoj troviĝas preskaŭ en ĉiuj regionoj de nia lando, plejmulte tamen en Junnan, Guangdong, Fugian, Tibeto kaj Tajvan.

Junnan-provinco estas plej abunda je termofontoj en Ĉinio. El ĝiaj pli ol 400 termofontoj, la plej

famaj estas tiuj de Tengĉong-regiono en la okcidenta parto de la provinco. Antaŭ ĉ. miliono da jaroj, tie aktivadis vulkanoj, sed nuntempe ili jam estingiĝis, tamen el iliaj krateroj kaj kreaĵoj de la terkrusto ankoraŭ senĉese elŝprucas alttemperaturaj gaso kaj akvo. La tieaj termofontoj estas ne nur multaj, sed ankaŭ alttemperaturaj kaj riĉaj je sulfuro. Ekzemple, la temperaturo de la termofonto Ĵeŝujtang en Tengĉong atingas 105°C kaj la ŝpruca gaskolono altas je dekoj da metroj. La termofonto Liuhuangtang en la loko kun temperaturo de 102°C multe entenas sulfuron, kiun la tieaj kamparanoj povas ekstrakti eĉ per simpla metodo.

*La fama termofonto Huakingĉi de Ŝenhi konstruiĝis en la sepa jarcento p.K. Post la Liberiĝo tie estis starigitaj multaj sanatorioj por oficistoj kaj laboristoj.*





Ankaŭ la provincoj Guangdong, Fugian kaj Tajvan apud la maroj sudoriente de Ĉinio havas multajn termofontojn, kies temperaturo ĝenerale superas  $40^{\circ}\text{C}$ , kaj ies en la provincoj Guangdong kaj Tajvan eĉ superas  $100^{\circ}\text{C}$ . Fuĝoŭ, la ĉefurbo de Fugian-provinco, havas tre multajn termofontojn. En iuj lokoj, oni ricevas varman akvon nur post fosado sub aluvion, kaj tiun kun relative alta temperaturo el puto  $40\text{-}70$  metrojn profunda.

La termofonto Conghua apud Kantono estas relative fame konata en Guangdong-provinco, pro sia akvo klara, senkolora, senodora kaj sengusta. La temperaturo de iuj fontoj atingas  $60^{\circ}\text{C}$  kaj tiu de aliaj  $30^{\circ}\text{C}$ . Tiaj termofontoj taŭgas ne nur por banado, sed ankaŭ por kuracado.

La temperaturo de la termofonto Pingdong en la sudo de Tajvan atingas  $140^{\circ}\text{C}$ , kiu estas la plej alta el tiuj de niaj termofontoj. La vulkana regiono Datun de Tajbej estas fama loko de termofontoj.

Sur Liaŭdong-duoninsulo kaj en Ĉangbaj-montaro en la Nordoriento de Ĉinio ankaŭ troviĝas multaj termofontoj formitaj de multaj fendoj kaj movado de subtera magmo.

Ankaŭ Alŝan-termofonto okcidente de la Granda Hin-an-montaro en la okcidenta parto de Gilin-provinco estas unu el la famaj termofontoj en la Nordoriento. En tiu loko svarmas fontoj, el kiuj iuj distancas unu de alia nur je kelkaj metroj, sed la temperaturo de ĉiu fonto estas malsama. Laŭdire, la mongolaj paŝtistoj de tiu loko kuracas malsanojn per tia akvo dum pli ol 100 jaroj kaj ricevis bonan efikon.

Sur la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo, la firsto de la mondo, sin trovas nemalmultaj termofontoj situantaj sur altaj montoj je pli ol  $4,000\text{-}5,000$  metroj super la marnivelo, eble ili estas la plej altaj fontoj en la mondo. La temperaturo de iuj fontoj superas  $80^{\circ}\text{C}$ , t.e. la bolpunkton de tiu loko. La temperaturo de Jangbaging-termofonto sur la Kinghaj-Tibeta Ŝoseo superas  $100^{\circ}\text{C}$ , tial oni nomas ĝin "bolanta fonto", kiu elŝprucigas akvokolonon kun alteco de 3 metroj. Ankaŭ en la ĉefurbo de Tibeto Lasao kaj ĉe la norda piedo de Himalajo troviĝas termofontoj. La arĝenta neĝo supre de la montoj kaj termofontoj malsupre formas apartan naturan mirindaĵon sur la alta kaj malvarma regiono. La plej interesa estas tio, ke en la riverujo de la meza

parto de Jalucangpo-rivero troviĝas multaj termofontoj kun alta temperaturo, kiuj elŝprucas ĉiŝoj post kelkaj horoj, kio kaŭzas morton al multaj fiŝoj.

Krome, la termofonto Hingzi sur Luŝan-monto de Gianghi-provinco kaj Huangŝan-termofonto de Anhuj-provinco ĉarmas vizitantojn ankaŭ per siaj belaj pejzaĝoj.

## UTILIGO

La ĉina popolo havas longan historion en utiligo de termofontoj. Antaŭ pli ol 2,000 jaroj oni jam sukcesis ekstrakti grandan kvanton da salo el iu akvofonto en Zigong de Siĉuan-provinco. Kaj antaŭ 1,300 jaroj oni jam komencis utiligi termofontan akvon en kuracado de diversaj malsanoj. Tiam la laborantaj popolanoj jam multe uzis ĝian akvon en servo al la ĉiutaga vivo kaj produkto. Post la Liberiĝo en 1949, la nova Ĉinio vaste utiligas termofontojn.


En la agrikulturo oni utiligas la akvon de termofontoj por kulturi rizplantojn kaj herbojn kaj irigacii kampojn. Ekzemple, la popolanoj de Jingĉeng-gubernio de Hubej-provinco kulturas fruajn rizplantojn per la akvo de termofonto, kio frugis la kulturan tempon je 20 tagoj. En Fengŝun-


gubernio de Guangdong-provinco, la lokanoj utiligas la termofonton por altigi la temperaturon de irigacia akvo kaj tiel solvis la problemon de putriĝo de fruaj rizplantoj pro printempa malvarmo. En kelkaj termofontaj regionoj de la provincoj Hubej kaj Gianghi oni kreskigas akvolektukon (*Pistia stratiotes*), kiu servas kiel nutraĵo por porkoj, eĉ en frosta vintro.

En la industrio, laboristoj de kelkaj regionoj de nia lando jam ĝenerale uzas la termofonton en ŝpinteksado, prestinkturado, paperpreparado, tanaĉo kaj prilaborado de cementproduktaĵo kaj brutoproduktaĵoj, tiel ke ŝpariĝis granda nombro da brulaĵoj. Krome iuj regionoj ekstraktas el la termofonta akvo sulfuraĵon, salpetron, jodaĵon, lition, boron kaj aliajn industriajn materialojn. En la lastaj kelkaj jaroj ni komencis uzi termofontan akvon kiel energian fonton por produkti elektron, kio ne nur ŝparas brulaĵojn, sed ankaŭ ne malpurigas aeron. Depost la jaro 1970, en kiu estis starigita la unua malgranda eksperimenta termoelektrejo de nia lando en Fengŝun de Guangdong-provinco, nun ankaŭ aliaj regionoj preparas konstrui tiajn elekcrejojn.

Dum multaj generacioj preskaŭ neniu loĝanto ĉe termofontoj suferis de reŭmatisma artrito aŭ

*Bajŝujtaj en Ĝongdian-gubernio, Junnan-provinco, estas formita el sedimentiĝo de termofontoj kaj sur ĝi troviĝas multaj karbonacidaj termofontoj.*






*Proksime de Anŝan troviĝas termofonta sanatorio Tanggangzi kaj tie la akvo kaj ŝlimaĵo kun temperaturo de 60° C entenas kemian elementon radonon kaj tre efikas en kuracado al pli ol 20 kronikaj malsanoj kiel reŭmatisma artrito kaj haŭta malsano.*

de haŭta malsano. Nun, nia lando konstruis pli ol 50 sanatoriojn en multaj famaj termofontaj regionoj. Tie oni kuracas malsanojn per termofonta

ŝlimaĵo kun certaj kemiaj elementoj, krom per bano kaj trinkado. Laŭ malsamaj termofontoj ili aplikas supre menciitan aŭ aliajn kuracajn metodojn kaj ricevas bonan efikon en kuracado de haŭta malsano, reŭmatisma artrito, intesta kaj stomaka malsano, stomaka ulcero, neŭralgio, komenca alt-sangpremo kaj virina malsano.

De antikveco iuj termofontoj de nia lando estas famaj turismaj lokoj. Tamen, en la pasinteco tiuj lokoj estis okupitaj de feŭdaj imperiestroj kaj reakciaj burokratoj. Ili konstruigis tie palacojn kaj vilaojn kiel diboĉeojn por riĉuloj. Nur en la nova Ĉinio la termofontoj vere fariĝis riĉaĵoj de la laboranta popolo. La plej fama Huakingĉi de Ŝenhi-provinco estas bona atestaĵo.

Huakingĉi situas ĉe la piedo de Liŝan-montaro apud la antikva urbo Hi-an, kie belas montoj, densas arbaroj kaj fluas torento el termofontoj. Ekde la Kin- kaj Han-dinastioj feŭdaj imperiestroj okupis kaj turnis ĝin en sian tutjaran amuzejon. Sed la popolanoj ne rajtis viziti ĝin. Post tio, kvankam ŝanĝiĝis kelkaj dinastioj, tamen la stato restis ankoraŭ tia. Nur post la fondiĝo de la nova Ĉinio Huakingĉi vere revenis en la manon de la laborantaj popolanoj kaj servas por ili. Nun tie ne nur la pitoreskaj kaj historiaj vidindaĵoj estas bone protektataj kaj riparitaj, sed ankaŭ nove konstruiĝis multaj sanatorioj bone ekipitaj kaj aldoniĝis banejoj, naĝejoj, hoteloj kaj restoracioj por turistoj.



### **ĜETKAJO POR 50,000-TONELAJ OLEŜIPOJ KONSTRUITA**

La nomita ĝetkajo estas konstruita en la ĉina haveno Ĝangiang kaj jam komencis ekfunkcii. Rezulte, la strukturo de la varfo pruviĝis bonkvalita kaj la funkciado de la instalitaj ekipaĵoj montriĝis normala.

Tiu varfo estas destinita speciale por oleaj ŝipoj kun spaco de 138-metroj por akcepti alkajiĝon de ŝipoj kaj necesaj instalaĵoj de ŝarĝoponto, interliga ponto,

kablofostoj kaj tiel plu. Unu dika oletubo etendiĝas de la maro al olerezervujo sur la varfo.

### **GRANDA GASREZERVUJO FINKONS- TRUITA EN ŜANHAJO**

La Ŝanhaja Gaskompanio konstruis la unuan grandan akvefiksitajn, spirale gviditan gasrezervujon en Ĉinio.

Kiel la plej granda gasrezervujo nuntempe en nia lando kun kapacito de 150,000 kubmetroj, ĝi estas dividita en kvin etaĝojn kaj povas facile leviĝi kaj malleviĝi. Levite, ĝi estas tiel alta kiel pli-ol-dek-etaĝa domo, kaj mallevite, ĝi elmontras sian rondan supraĵon nur kelkajn metrojn altan super la tero. Ĝi ludos grandan rolon en disvolvado de urba gasprovizado.



## Ĉinaj Naciecoj

**Ŝ**E-NACIECO havas pli ol 230,000 membrojn kiuj vivas en la provincoj Fugian, Ĝegiang, Gianghi, Guangdong kaj Anhuj, plejparte en Fugian. Sole en la regiono de Ningde troviĝas pli ol 134,000 ŝe-oj. Ilia lingvo apartenas al la hano-tibeta familio. La ŝeoj en diversaj lokoj fundamente parolas la dialekton *kegia* de han-a lingvo kaj skribe uzas la ĉinan ideografion.


La nomo de ŝe-nacieco estis frue registrita en la historio. Jam en la 7-a jarcento, oni trovis ŝeojn loĝantajn en la limregiono inter la provincoj Fugian, Guangdong kaj Gianghi. Sub la premado de la feŭda registaro de diversaj dinastioj ŝe-popolo devigate migris en montregionoj kaj tie ekloĝis sin nomante “montgastoj”, t.e. ili estas gastoj el aliaj lokoj. Ekde la 14-a jarcento ili jam fiksloĝis en la lokoj, kie ili nun vivas.

En la longa tempo antaŭ la Liberiĝo, la ŝe-popolo suferis pezajn subpremadojn kaj ekspluata-

## La ŝe-oj

ZONGMIN

don de la reacia reganta klaso. Ili devis doni la plejparton de sia rikoltita greno al bienuloj kaj sin vivtenis per batato kaj sovaĝaj legomoj. Sendistinge en vintro kaj somero, ili vestis sin nur per tolaj vestaĵoj kaj en frosta sezono varmigis sin ĉirkaŭ *honglong* (fajrokaĝo). Ili multfoje batalis kontraŭ la subpremado kaj ekspluatado kune kun la han-aj laboruloj. En la periodo de la Dua Enlanda Revolucia Milito, sub la gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio, en multaj ŝe-aj montvilaĝoj oni plenumis la agraran revolucion kaj fondis demokratian reĝimon de laboristoj kaj kamparanoj, turnante la vilaĝojn en revolucion bazlokon. Post la formariĝo de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo al nordo por rezisti kontraŭ la japanaj agresantoj, la ŝe-popolo persiste batalis kune kun la han-a popolo por konservi la revolucionajn fortojn. En la periodo de Liberiga Milito, multaj bravaj gefiloj de ŝe-popolo partoprenis la geriladon kaj akorde kun la Liberiga Armeo renversis la lokan reacion regadon de Kuomintango. En la long-



*Ŝe-aj komunumanoj sunumas novan grenon.*



tempa laboro kaj batalo, ŝe-popolo starigis tre intiman rilaton kun han-popolo.

Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, estas plenumata la nacia politiko fiksita de Prezidanto Maŭ, kaj komplete abolita la subprema sistemo kontraŭ la nacimalplimulto. Ankaŭ la ŝe-popolo leviĝis kiel mastro de la lando. La Partio kaj registaro aktive kulturis ŝe-ajn kadrojn. En popolrepresentaj kaj registaraj organoj de ĉiuj niveloj ŝe-popolo havas siajn reprezentantojn kaj komitatanojn. Lej Jingking, kies antaŭuloj estis dungitoj de bienuloj de generacioj antaŭ la Liberiĝo, hodiaŭ ne nur fariĝis la sekretario de la partia filio de Gitoŭ-brigado de Ningde-gubernio, Fugian, sed ankaŭ estis elektita kiel membro de la revolucia komitato de Ningde-regiono kaj provinca partia komitatano de Fugian. En la Naŭa kaj la Dekaj Kongresoj de la Komunista Partio de Ĉinio troviĝis ankaŭ elstaraj reprezentantoj el ŝe-aj partianoj.

La ŝe-oj ĉefe okupiĝas pri agrikultura produktado. Post la Liberiĝo, la produktado rapide disvolviĝas sub la brilo de la nacia politiko de la Partio. En la jaro 1958, la ŝe-oj fondis popolajn komunumojn. Sur la bazo de agrikultura kolektivigo, en la amasa movado de "lerno de Daĝaj en agrikulturo", ili grandskale realigis konstruadon de akvoutiligaj konstruaĵoj kaj kampoj, kaj tiel

turnis la kampojn kun malalta produkto en tiujn kun stabile alta produkto, garantiata tiel por sekeca jaro kiel por jaro tro abunda je pluvo. En la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, kritikante la reviziismajn liniojn de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ, kaj la reakciajn, putrintajn pensojn de Konfucio, la ŝe-popolo ankoraŭ pli energie sin ĵetis en la bataladon por reformi la montojn kaj riverojn. En la Giulong-brigado de Hiki-komunumo de Fu-an-gubernio, Fugian, konata kiel "floro de Daĝaj sur Giulong-monto", la komunumanoj peneme luktitis per siaj propraj fortoj kaj sub tre malbonaj kondiĉoj de alta monto, malvarma akvo kaj malgrasa grundo sukcesis reformi siajn malmulte produktantajn kampojn kaj kreis rekordan produkton de pli ol 500 kilogramoj da greno po-mue. Antaŭ la Liberiĝo, en la produkta grupo Luli de Ĉangĉun-komunumo de Hiapu-gubernio, la pomua produktokvanto de greno ne superis 150 kilogramojn. Sed en la jaro 1973 ĝi jam superis 740 kilogramojn.

Antaŭ la Liberiĝo la ŝe-popolo multe suferis pro manko de klereco. En la gubernio Liŝuj, Ĝegiang, estis pli ol 20,000 ŝe-oj kaj inter ili troviĝis nur du personoj, kiuj ricevis edukon de elementa lernejo antaŭe. Post la Liberiĝo, la popola registaro laŭvice fondis instruistan lernejon kaj mezlernejon por nacimalplimulto en Ĝegiang kaj Fugian.

La ŝeoj de diversaj lokoj ankaŭ sendis siajn gefilojn al universitatoj en Pekino kaj aliaj lokoj por ricevi altan edukon. Nun, ĉiuj montvilaĝoj de ŝe-oj havas siajn elementajn lernejojn, kaj ĉiuj komunumoj mezlernejojn. Krome, ĉie estas fonditaj kooperaj kurac-stacioj kaj kulturataj nudpiedaj kuracistoj. Ŝoseoj atingas ĉiujn vilaĝojn kaj vilaĝetojn, kie elektraj lampoj brilas en la nokto. Senrevene forpasis jam la mizera vivstato de la ŝeoj kiel priskribita en montkanto jene:

*Kaverno servas al ni kiel domo,  
Kaj ŝnuro ĉe l' talio nia zono.  
Fajrkaĝon prenas ni anstataŭ vato,  
Sovaĝ-legomon kontraŭ la malsato.*

La ŝe-popolanoj tre ŝatas montkanton, kiu estas ilia buŝa literaturo. Antaŭ la Liberiĝo, per siaj montkantoj ili akuzis la subpremadon kaj la ekspluatadon de la malnova socio kaj prikantis la kontraŭbatalojn de la popolo. Post la Liberiĝo, la montkantoj de ŝeoj ne nur havas novan socialisman enhavon, sed ankaŭ disvolvis sian originan formon. Kaj la longe perdiĝinta ŝe-a danco ankaŭ estis ree elfosita kaj ordigita.

La ŝe-aj kostumo kaj metiartaĵoj havas klaran nacian koloron tute apartan. Ĉe la kolumo, vestklapo kaj manikoj de virina kostumo estas borderitaj per brodaĵo. La virino zonas sian talion per kolora rubando kun brodita floraĵo aŭ geometriaĵ

desegnaĵoj, kaj portas ĉirkaŭjupon. En iuj regionoj la virinoj portas mallongan jupon kaj krurzonojn kaj aranĝas sian hararon spiralaĵe sur la verto.

La nacia politiko de Prezidanto Maŭ Zedong plie disvolvis la intiman amikecon inter la han-a kaj ŝe-a popoloj. En la ŝe-aj regionoj, ĉie ŝvebas kantoj pri unuiĝo kaj komuna batalado inter la han-a kaj ŝe-a popoloj, kaj cirkulas la rakontoj pri kortuŝaj aferoj en unuanima kaj kuna luktado ŝultro ĉe ŝultro por konstrui socialisman novan montregionon faritaj de ŝe-oj kaj hanoj, sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. La akvoutiliga konstruaĵo de Hongkiaŭling de Hilan-komunumo de Luojuan-gubernio, Fugian, estis ĉesigita sub la ĝenado de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki. La komunumanoj de la du naciecaj popolanoj unuiĝis en la Granda Proleta Kultura Revolucio, kaj unuanime luktis dum du sinsekvaj vintroj kaj printempoj ekde la jaro 1971, ili konstruis kanalon kun rokaĵaj talusoj longan je pli ol 3,000 metroj, kiu kondukas akvon tra vilaĝoj enloĝataj de han-oj kaj ŝe-oj, tiel ke solviĝis la minaco de akvomanko por pli ol 3,000 muoj da agroj. La du popoloj varme kantas:

*De l' sama radiko plenstabl' da vinberaj grapoloj,  
Sin ligas per koro kun koro ŝe- kaj han-popoloj.  
Samvole ili alkondukas klarakvon tre dolĉan,  
Portantan al ĉiuj vilaĝoj pejzaĝon plej sorĉan.*



*Montvilaĝo de ŝe-oj en Ĉangcun-komunumo de Hiapu-gubernio*



# Respondoj pri abonado de nia gazeto

**Demando:** Kiu nun estas distribuanto de la gazeto EPĈ?

**Respondo:** Nia ĝenerala distribuanto nun fariĝas Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), kiu pro tio starigis jam speciale Esperantan Sekcion kaj uzas daŭre la adreson: P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

Ĉar ĝi havas agentojn en diversaj landoj, sekve ankaŭ tiuj agentoj (librejoj) akceptas abonojn de nia gazeto. Se en iu urbo estas librejo, kiu vendas eldonaĵojn el Ĉinio, ĝi estas tre probable agento de Guozi Shudian, kiu lasta estas la sola eksportanto de ĉinaj eldonaĵoj. Pri tio oni tamen devas unue certigi ĉe la koncerna librejo. Se ĝi konfirmas tion, oni povas aboni nian gazeton ĉe ĝi, kaj tiu prizorgos la aferon por la paginto. Ĉu estas agento en iu urbo kaj kiu ĝi estas, pri tio oni kompreneble povas informiĝi letere ĉe Guozi Shudian.

Malnovaj perantoj de nia gazeto (esperantistoj) estis petataj daŭre funkcii, kaj oni povas aboni nian gazeton ankaŭ pere de tiuj perantoj.

Se iu abonas kaj pagas ĉe agento aŭ peranto, oni bonvolu doni la abonilon aŭ adreson ankaŭ al li kune kun la pago. Ne sendu ĝin aparte al Guozi Shudian! La abonitajn numerojn oni ricevos rekte de Guozi Shudian, al kiu la agento aŭ peranto ĉiam informas pri ricevitaj abonoj.

Nature oni ankaŭ povas aboni nian gazeton rekte ĉe Guozi Shudian mem laŭ la adreso menciita supre.

**D.:** Kiom kostas abono de EPĈ kaj kiel pagi la abonon?

**R.:** La abonkosto varias laŭ abondaŭro kaj lando. 2-jara kaj 3-jara abonoj estas kompare pli malkaraj ol la unujara. Abontarifon petu ĉe Guozi Shudian. Oni povas informiĝi ankaŭ ĉe agentoj kaj perantoj pri abonkosto por la koncerna lando.

La abonkoston oni pagu per mono al agentoj aŭ perantoj. Al Guozi Shudian oni

povas pagi per ĉeko aŭambio aŭ sendi la sumon al:

A/C Guozi Shudian, Bank of China (banko de Ĉinio) 111 Cannon Street, London EC4N 5AS, Anglio kun la indiko: Por Esperanta Sekcio

**D.:** Ĉu vi povas informi min, je kiu numero finiĝos mia abono?

**R.:** La periodo de abono de ĉiu abonanto estas indikita supre sur la adresoslipoj, kiun ĉiu abonanto de nia gazeto povas facile trovi sur la koverto de ĉiu ricevita numero. Ekzemple, "1/74 — 12/76" signifas: la abono komenciĝas de n-ro 1 de 1974 kaj finiĝos je n-ro 12 de 1976. Estas dezirinde ke la abonanto konstante tion legu por ke li povu ĝustatempe renovigi sian abonon kaj daŭre ricevi nian gazeton sen interrompo.

Se la abonanto deziras ŝanĝi sian adreson aŭ havas ian deziron koncerne sian abonon, li estas petata kunsendi tiun adresoslipon al Guozi Shudian (nur al ĝi). Tio faciligos la administracian laboron kaj akuratan plenumon de la deziroj.

**D.:** De kiu numero mi komencos ricevi, se mi nun faras la abonon? Ĉu mi povos ricevi la kompletan jarkolekton de 1975?

**R.:** Ĝenerale abonoj estas akceptataj tra la tuta jaro kaj komenciĝos de la tuj aperonta numero. Oni kalkulas 12 numerojn por unu jaro, 24 numerojn por du jaroj ktp.

Sed en speciale difinita periodo GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj) kulture lanĉas kampanjon por varbi novajn abonantojn por la venonta jaro. Nun la kampanjo por 1975 jam komenciĝis. Se vi tuj abonos nian gazeton, vi povos ricevi la kompletan jarkolekton de 1975 kaj ankaŭ memoraĵon por abonantoj de la jaro (Esperanta kalendaro de 1975).

La distribuanto tre petas ke la abonantoj varbu por nia gazeto novajn abonantojn. Se vi sukcesos, bonvolu skribi al la distribuanto, kiu estas preta por sendi al vi ian memoraĵon kiel dankesprimon.

La Red.



# EL POPOLA ĈINIO


## Abonoj kaj abonigoj por 1975 varbataj

<b>Abonprezoj:</b>	1-jara	£ 0.90	US\$ 2.20
	2-jara	£ 1.35	US\$ 3.30
	3-jara	£ 1.80	US\$ 4.40

**Ĝenerala Distribuanto: GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)  
P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio**

**Abonu ĉe niaj lokaj agentoj aŭ EPĈ-perantoj aŭ rekte ĉe Esperanta  
Sekcio de GUOZI SHUDIAN**

**Specimeno senpaga laŭ peto**



### NOVA HIDROELEKTREJO EN GUJĜOŬ

Sur branĉo de la rivero Vugiang, estas nove konstruita mezgranda hidroelektra stacio ĉijare en Gujĝoŭ-provinco, nomata Hong-jan. La branĉo longas 180 kilometrojn, kiu laŭ la plano de la ŝtato estas ekspluatita ŝtupare. Kaj la nomita elekotrejo estas la lasta de la ŝtuparo. Ĝia ĉefa konstruaĵo inkluzivas baraĵon de

duobla kurbeco 60 metrojn altan, akvokondukan tunelon 184 metrojn longan kaj elektrejajn domojn. Kvankam kompleksa estas la loka geologia strukturo kaj implikiĝas kaverno kaj subteraj riveroj formitaj sub malkomponiĝo de kalkŝtona roko, tamen kun la filozofia penso de Prezidanto Maŭ Zedong kiel armilo, la vasta amaso de laboristoj kaj oficistoj serioze analizis kaj solvis diversajn kontraŭdirojn, aplikis malsamajn tipojn de baraĵo laŭ la malsamaj kondiĉoj geologiaj kaj terformaj kaj konstruis plurajn elektrejojn, kiuj jam estas provitaj de akvego. Kaj tio ankaŭ liveris sperton por konstrui elektrejon en karstaj regionoj

# Scienca kaj Teknika Gazetoj el Ĉinio

(1975)

**Scientia Sinica** (Ĉina Scienco) — Dumonata gazeto en la ĉina lingvo.

**Scientia Sinica** (Ĉina Scienco) — Dumonata gazeto kun ĉefaj artikoloj en la angla lingvo.

**Chinese Medical Journal** (Ĉina Medicina Gazeto) — Monata gazeto en la ĉina lingvo.

**Chinese Medical Journal** (Ĉina Medicina Gazeto) — Dumonata gazeto en la angla lingvo.

\* \* \*

**Kexue Tongbao** (Scienca Informilo) — Monata gazeto en la ĉina lingvo kaj kun enhavolisto en la angla lingvo.

**Huaxue Tongbao** (Kemia Informilo) — Dumonata gazeto en la ĉina lingvo kaj kun enhavolisto en la angla lingvo.

**Kaogu** (Arkeologio) — Dumonata gazeto en la ĉina lingvo kaj kun enhavolisto en la angla lingvo.

**Wen Wu** (Historiaj Kulturaj Objektoj) — Monata gazeto en la ĉina lingvo.

\* \* \*

**Kexue Shiyan** (Scienca Eksperimento) — Monata gazeto en la ĉina lingvo.

**Geographical Knowledge** (Geografia Scio) — Dumonata gazeto en la ĉina lingvo.

**Physics** (Fiziko) — Dumonata gazeto en la ĉina lingvo.

**Practice and Knowledge in Mathematics** (Praktiko kaj Kono en Matematiko) — Trimestra gazeto en la ĉina lingvo.

\* \* \*

La jenaj gazetoj estas eldonataj en la ĉina lingvo kaj kun resumo de ĉefaj artikoloj kaj enhavolisto en la angla lingvo.

**Scientia Geologica Sinica** (Geologia Scienco) — Trimestra gazeto.

**Acta Geophysica Sinica** (Geofizika Bulteno) — Trimestra gazeto.

**Acta Zoologica Sinica** (Zoologia Bulteno) — Trimestra gazeto.


**Acta Microbiologica Sinica** (Mikrobiologia Bulteno) — Trimestra gazeto.

**Acta Archaeologica Sinica** (Arkeologia Bulteno) — Semestra gazeto.

**Acta Astronomica Sinica** (Astronomia Bulteno) — Semestra gazeto.

**Vertebrata Palasiatica** (Palevertebruloj kaj Antropologio) — Trimestra gazeto.

## Ankaŭ mi faras bonon



**Acta Botanica Sinica** (Botanika Bulteno) — Trimestra gazeto.

**Acta Phytotaxonomica Sinica** (Fitotaksonomia Bulteno) — Trimestra gazeto.

**Acta Entomologica Sinica** (Entomologia Bulteno) — Trimestra gazeto.

**Acta Genetica Sinica** (Genetika Bulteno) — Trimestra gazeto.

**Acta Mathematica Sinica** (Matematika Bulteno) — Trimestra gazeto.

**Acta Physica Sinica** (Fizika Bulteno) — Dumonata gazeto.

**Architectural Journal** (Arkitektura Bulteno) — Trimestra gazeto.

**Distribuanto:** Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Pekino, Ĉinio.

**Abonu ĉe lokaj agentejoj aŭ rekte ĉe Guozi Shudian, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.**

## Sur la Kovrilo:

Diversnaciaj popolanoj ĝoje kantas.

## Sur la Dorskovrilo:

Diversaj amuzaj ludoj en la festotago



# EL POPOLA ĈINIO 中國新道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

---

**N-ro 12 (197) 1974**

---

## Ĉefa Enhavo

Celebro de la 25-a datreveno de la fondiĝo de la nova Ĉinio .....	1
Nova petrolkampo memkonstruita.....	6
La nove konstruita Hunan-Gujŝou-a Fervojo.....	9
Granda ŝanĝiĝo de la Flava Rivero.....	13
Pompaj artaj floroj.....	18
Multesperiga juna generacio.....	22
Kiel Ĉinio eliminis narkotisman?.....	25
Lusin — revoluciulo kiu senkompromise batalis kontraŭ Kong-butiko .....	27
Niaj amikoj troviĝas ĉie tra la mondo.....	31
“Ĉiam antaŭen!”.....	36
Hindio senbride aneksis Sikimon.....	40
La termofontoj de Ĉinio.....	41
La ŝe-oj .....	45

# Memoraj poŝtmarkoj por celebri la 25-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko



J3(3-1)

1974



J3(3-1)

1974



J3(3-2)

1974



J3(3-3)

1974

